


**PAIVA NETTO atentigas al "Krueleco kontraŭ infanoj", kaj asertas ke:**
**"Fermi la okulojn antaŭ perforto kontraŭ infanoj kaj kruelaj konsekvencoj de tio estas ia barbaraĵo ankoraŭ tre ofta en la mondo"** (legu la kompletan tekston sur la paĝo 4)

www.bonavolo.com

# BONA VOLO

JARKOLEKTO 29 • N-ro 74

ELEVAÇÃO



## Ĉu ni sukcesis?

Rio-de-Ĵanejro okazigas la 50-an Brazilan Kongreson de Esperanto, kiu temas pri disvastigo kaj evoluigo de la uzo de la internacia lingvo en Brazilo.

**FAVORE AL LA VIVO:** Urĝas kontraŭbatali memmortigon, kaŭzo de unu miliono da mortoj ĉiujare en la mondo.




Ni atendas Vin! Trovu nian paĝaron ĉe la sociaj retoj.
Se Vi ankaŭ volas ricevi niajn bultenojn,
skribu al esperanto@bonavolo.com.

www.facebook.com/BonaVolo

www.twitter.com/BonaVolo

www.youtube.com/PortaloBonaVolo

BONA VOLO.com

## MEDITADO PRI BONA VOLO

Paco, la vera Paco, naskiĝas unue el la pura koro de homo. Kaj nur **Jesuo** povas purigi la koron de la Homaro je ĉia malamo, ĉar Jesuo estas la Sinjoro de Paco. Kaj Li mem, kiel tiomfoje rememorigis **Alziro Zarur** (1914-1979), la karmemora Fondinto de Legio de Bona Volo, asertas: *"Mi estas la Vinberarbo; vi estas la branĉoj; sen mi vi nenion povas fari. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu. Mi estos kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo. Mi ne lasos vin orfaj. Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj."*

**(Evangelio de Jesuo, laŭ Johano, 15:5, 14:1 kaj 18; 13:34 kaj 35 kaj 15:12 kaj 13).**

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

29-a jarkolekto • N-ro 74

**BONA VOLO estas kvarmonata publikaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.**

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto — MTE/DRTE/RJ 19.916 JP


**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Angélica Periotto, Camilla Lopes, Cida Linares, Fabiano Henrique, Felipe Duarte, Francisco Stefano Wechsler, Gabriela Marinho, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Lísia Peres, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo Sergio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**KOVRILO:** Diego Ciusz

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO:** Diego Ciusz kaj Helen Winkler

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:**
Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brasil [Brazilo] • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • www.bonavolo.com



**4** Paiva Netto skribas: Krueleco kontraŭ infanoj



**20** Templo de la Dia Ekumenismo



**28** Ĉu ni sukcesis?

4 **Mesaĝo de Paiva Netto** Krueleco kontraŭ infanoj

7 **Leteroj, retpoŝtoj kaj registroj** Esperantistoj skribas al BONA VOLO

18 **Literaturo** "Libro, kiu riĉigas la animojn"

20 **TBV** Templo de la Dia Ekumenismo

24 **Evento** 99-a Universala Kongreso de Esperanto

28 **Kovrilo** Ĉu ni sukcesis?

32 **Edukado** Formado de planedaj civitanoj

38 **LBV kaj UN** Edukado kaj daŭripoveco

42 **Konduto** Ĉiam favore al la vivo

48 **Junula Agado LBV** Ĉu la spiritoj povas influi niajn decidojn?


50 **Soldatetoj de Dio** Lernado kaj aktivecoj



# KRUELECO KONTRAŬ INFANOJ



Shutterstock.com



Raquel Bertolin

José de Paiva Netto estas verkisto, ĵurnalisto, radikronikisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter). Li estas membro de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Ŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radikomunikantoj de Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ Akademion de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri konceptado kaj defendado de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *"lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko, Honesteco, Frata Amo"*.

Fermi la okulojn antaŭ perforto kontraŭ infanoj kaj kruelaj konsekvencoj de tio estas ia barbaraĵo ankoraŭ tre ofta en la mondo. Tion montras al ni la raporto de Fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Infanaro (Unicef) nome "Nevideblaj sub plena lumo", kiun oni dissendis je la 4-a de septembro 2014.

Laŭ tiu internacia organo: *"Ĝi estas la plej granda kolekto de datumoj iam ajn farita pri perforto kontraŭ infanoj."* Tiu laboraĵo, kun ciferoj kolektitaj el 190 landoj, detale montras la terurajn kaj daŭrajn sekvojn de agresoj suferitaj en infan-junula aĝo. La viktimoj poste fariĝas plenaĝuloj pli inklinaj al senlaboreco, al malriĉa vivo kaj al agresema konduto. Kaj jen estas punkto, kiun oni devas zorge konsideri. La esploristoj rimarkigas, ke tiu studaĵo koncernas nur individuojn, kiuj povis kaj volis respondi la demandojn. Tio estas, la starigitaj kalkuloj

Desegno: William Luz – Soldatetoj de Dio, de LBV.



Jesuo, en la Evangelio laŭ Mateo, 19:14, sin prezentis kiel Dia Sekureco al la infanoj: *"Lasu la infanojn, kaj ne malhelpu ilin, veni al m; ĉar el tiaj estas la Regno de la Ĉielo".*

montras etan parton de la problemo.

Tio okazas ĉar la komunumoj, lernejoj, hejmoj ne plenumas kontentige siajn devojn rilate la etulojn. D-ro **Anthony Lake**, plenumdirektoro de Unicef, estas emfaza: *"Tiuj estas malkomfortaj situacioj — neniu registaro, aŭ patro, aŭ patrino emas vidi ilin."* Tamen, kiel li mem substrekas, ni devas alfronti la faktojn, se ni emas ŝanĝi la pensmanieron, kiu opinias normala kaj permesinda tiun ĉiutagan perfortadon, ĉie. Kaj li kompletigas: *"Kvankam la infano estas la plej damaĝata, tio ankaŭ disrompas la socian strukturon kaj subfosas stabilecon kaj progreson. Sed tia perfortado ne estas neevitebla. Oni povas preventi tion — kondiĉe ke oni rifuzas lasi, ke tio restu en ombro."*



Anthony Lake

Iuj ciferoj montritaj per tiu esploro, en tutmonda nivelo, informas al ni, ke infanoj kaj adoleskantoj malpli ol 20-jaraĝaj konsistigas unu kvinonon el la viktimoj de murdoj, kio signifas proksimume 95 mil mortojn dum la jaro 2012; ĉirkaŭ 120 milionoj da knabinoj malpli ol 20-jaraĝaj (proksimume po unu el dek) estis devigitaj koiti aŭ praktiki aliajn seksajn agojn; kaj iom pli ol po unu el tri lernantoj 13- ĝis 15-jaraĝaj estas viktimoj de *bullying* [humiliga persekutado] ĉe lernejoj.

## Kion fari

Unicef indikis strategiojn, por ke la tuta socio, de familioj ĝis registaroj, povu strebi al reduktado de tia tragedio. Ili inkluzivas *"apogadon al gepatroj kaj elvolvadon, flanke de la infano, de vivkapabloj; ŝanĝon de sintenoj; fortigon de juraj, krimkoncernaj kaj sociaj sistemoj kaj servoj; produktadon de evidentaĵoj kaj konsciigadon pri la perforto kaj ties homaj kaj sociekonomiaj altaj kostoj, cele al ŝanĝado de sintenoj kaj normoj".*

Inter la multenombraj laborfrontoj de Legio de Bona Volo, bona zorgado de infanoj estas unu el la plej gravaj kaj rekonataj agadoj. Mi havas grandan esperon pri la semado, kiun ni faradas de pli ol 65 jaroj en korojn homajn kaj spiritajn. Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano, kiujn ni disvolvas en la instrureto de LBV, kun la apogo de la popolo, havas altajn celojn gardi la infanaron kaj la junularon kontraŭ socia risko. La kvanto da antaŭtempaj forlasoj ĉe la lernejoj de LBV estas nula, informas la direktorino de la Eduka Ensemblo Bona Volo, en San-Paŭlo, Brazilo, doktoriĝanto pri Edukado **Suelí Periotto**.

Oni havas nenian garantion pri iu pli bona estonteco por nacioj, kiuj ne respektas fundamentajn rajtojn de infanoj kaj junuloj. Kaj ne eblas kreskado, ĉu materie, ĉu spirite sana, sen amo, sen frata amo.

Ĝuste plenumi la respondecojn, kiuj nin koncernas estas jesi al la admono de Jesuo, la Kristo Ekumena, tio estas universala. En Lia Evangelio, laŭ **Mateo**, 19:14, Li diris: *"Lasu la infanojn, kaj ne malhelpu ilin, veni al mi; ĉar el tiaj estas la Regno de la Ĉielo."*

Legio de Bona Volo kaj ĝia direktoro-prezidanto, José de Paiva Netto, sentas honoritaj por ricevi multnombrajn leterojn de samideanoj el pluraj mondopartoj kaj ni dankas ĉiujn por via subteno, kuraĝigo kaj gratulvortoj. Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn, ni apartigas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:

BRAZILO



Kara s-ro José de Paiva Netto, delonge mi scias pri via laboro pri la Paco. Mi gratulas vin pro tre bela artikolo "La granda Homar-familio". Mi opinias ke apenaŭ la frazo "Socio ne ekzistas sen familio" estus sufiĉa por ĉiuj, kiuj komprenas la valoron de la familio. Dankon!

**Antonio Félix da Silva**
Prezidanto de la
Esperanto-Klubo de
Florianopolo

PAKISTANO



Mi elkore aplaŭdas la agadojn de s-ro José de Paiva Netto por la virinoj. Liaj pensoj kaj proponoj por la virina libereco estas tre gravaj. Ni devas kune labori por la homara egaleco, nur tiel maniere oni povas havi pacon en la mondo.

**Saeed Ahmad Farani**
Profesoro


AŬSTRALIO



Refoje mi devas gratuli José de Paiva Netto. Li sincere skribas tion, kion mi ne povus vortigi. (...) Li longe vivu; la nuna mondo bezonas lin. Ni ne povos progresi sen li.

**Bob Felby**
Muzikisto


FRANCIO



Legio de Bona Volo ne nur edukas kaj flegas la homojn, sed ĝi estas inter la kelkaj internaciaj aŭ naciaj asocioj kiuj uzas Esperanton por rilati internaciskale. Tio jam montras grandan malfermon al nia mondo. Mi gratulas ĉiujn kunlaborantojn kaj efikajn "motorojn".

**Renee Triolle**
Reprezentanto de
Universala Esperanto-Asocio
ĉe Unesko

GERMANIO



Karaj amikoj,
Respektinda prezidanto de [Legio de] Bona Volo, via agado por [Legio de] Bona Volo kaj Esperantujo estas grava por la homoj en la tuta mondo. Ne ĉiuj kapablas kaj havas forton kiel vi agi por la bono de Esperantujo kaj unuopaj homoj. Mi deziras al vi sanon kaj feliĉon. Krome mi deziras sukceson en internacia agado.
Se oni havus pli da similaj homoj kiel vi, la mondo estus pli bela kaj pacema.

**Alicja Lewanderska-Quednau**
Ĵurnalistino kaj
vicdirektorino de Internacia
Universitato Karlovo

ALBANIO



Via laboro [de Paiva Netto] estas inspiriĝo por ĉiuj ni: Dio esta Amo.

**Engjell Gusho**
Kuracisto

POLLANDO

Mi dankas pro la grava, eksterordinara laboro por paco inter nacioj, por amo kaj amika kunlaboro. Mi estas ege feliĉa, ke vi por ĉi tiu agado uzadas nian belan internacian lingvon Esperanton!
Havu prosperon, semu pacon al homaj koroj!
Elkorajn amikajn salutojn el Rybnik.

**Teresa Konsek**
Instruistino

Agado de Legio de Bona Volo estas volo de Dio.

**Wacław Rekowski**
Teknikisto pri elektro

Mi sincere admiras vian penigan laboron por amo, harmonio kaj solidareco kaj min tre ĝojigas, ke al tiu ĉi laboro vi uzadas nian amikecan lingvon Esperanton. Nun via granda laboro havas multe da bonaj fruktoj kaj certe ĝi semos multe da bonaj ideoj kaj agadoj en homajn korojn en estonteco.
Elkorajn salutojn el Bjalistoko, el la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof.

**Anna Mocarska**
Normkontrolisto

ITALIO

Mi ne havas taŭgajn vortojn por komenti la artikolon de José de Paiva Netto, kiu tiras nin supren al la dia harmonio en la kosmo.
Amike,

**Renato Corsetti**
Lingvisto kaj eksprezidanto de la Universala Esperanto-Asocio

BULGARIO

Por mi Legio de Bona Volo prezentas bonfaran universon, kies virtojn mi ne povus honorigi aparte. (...) Mi tutkore dankas al LBV pro la zorgoj pri la Vivo ekde ĝia koncipiĝo per instruado kaj amo.
Benplenan dankon al ĉiuj bonservantoj dum diversaj epokoj kaj el patrujoj tra la tuta mondo, kies nobligantajn saĝecojn s-ro Paiva Netto revivigis en sia instrua libro "Meditadoj el la Animo". Mi jam kelkfoje emfazis la fascinan komprenebleco de ĉio skribita, verkita, tradukita de niaj talentaj samideanoj en Legio [de Bona Volo].
Kun admiro mi dankas al la fervoraj geesperantistoj, partoprenigantaj nin en la kuraĝigaj agadoj.

**Lilia Nikolova Koleva**
Poetino

ĈINIO

Mi unuafoje malfermas vian retpaĝon kaj trovis, ke estas sufiĉe bona kaj alloga por mi ĉar en ĝi legeblas multaj informoj malfacile akireblaj en aliaj retpaĝoj. Kaj mi deziras, ke mi fariĝu ofta leganto de via retpaĝo. Elkoran dankon pro via bona laboro!

**Verdeca**

DEMOKRATA RESPUBLIKO DE KONGO

Salutojn el DRKongo.
Feliĉan datrevenan festadon de la Templo de Bona Volo!

**Joel Muhire**
Studento

Fotoj: Arkivo BV






Kanjo Kanev





1) Parto de la ĉeestantaro dum la festo pro la 40-a datreveno de Esperanto-Societo “Kolombo de la Paco”.
2) S-ro **Kanjo Kanev** (C) kaj liaj familianoj, kiuj prestiĝigis la eventon, pozas apud la panelo “Amika Brazilo — Legio de Bona Volo”.
3) Esperantistino **Miglena Miteva** kun ekzemplero de la libro *Meditadoj el la Animo*, aŭtorita de la verkisto Paiva Netto.
4) Bulgara kolonelo Kanjo Kanev (MD), apud la unua vicurbestro de Galabovo, inĝeniero **Plamen Barakov**, honora membro de Esperanto-Societo “Kolombo de la Paco”.

# Rekte el Bulgarujo

Unua plia evento de la E-komunumo sukcesis en 2014: la Esperanto--Societo “Kolombo de la Paco” memorigis sian 40-an jaron de agado kune kun la 125-a datreveno de Esperanto.

Tiun renkonton partoprenis proksimume 200 homoj, kaj ĝin disvastigis loka kabla televido. Tiam Legio de Bona Volo estis omaĝata per afiŝoj ekspoziciataj al la partoprenantoj, laŭ iniciato de bulgara kolonelo **Kanjo Kanev**, delonga amiko de LBV.

La panelo “Amika Brazilo — Legio de Bona Volo” kunigis informojn pri la Institucio, kaj ankaŭ fotojn pri la Templo de Bona Volo. Aldone, estis disponeblaj al la ĉeestantoj por legado kelkaj ekzempleroj de la libro *Meditadoj el la Animo*.

LBV sendas multajn bondezirojn al Esperanto-Societo “Kolombo de la Paco”.

Fotoj: Derli Francisco




# Disvastigo pritraktita en Brazilo

*Esperanto, kial ne? — Disvastigado kaj instruado de la lingvo* estis la temo de la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto. La evento okazis en Florianopolo kaj estis aŭpiciita de la loka klubo, kun apogo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) kaj de la registaro de Ŝtato Sankta Katarino. Muzikoj, prelegoj, studoj, arto kaj intensa kunfratiĝo riĉigis la programon.

Legio de Bona Volo alportis al la kongresanoj plurajn publikaĵojn en la universala lingvo, inter kiuj elstaris la libro *Meditadoj el la Animo*, furoraĵo de verkisto **José de Paiva Netto**, brazila aŭtoro kun pli ol 6 milionoj da venditaj ekzempleroj.

Krom tiu verko, la esperantistoj havis la oportunon aĉeti la porinfanajn librojn *En la betesda lageto* kaj *Sanigo de paralizulo*, el la ekumena kolekto "La mirakloj de Jesuo", kaj ĉeesti la prelegon de LBV titolitan







1) Parto de la ĉeestantaro, kiu spektis la prelegon prezentitan de LBV ĉe la Brazila Kongreso de Esperanto.
2) La ĉeestantaro atente sekvas la solenan malfermon de la esperanto-kongreso.
En la ronda foto, la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, **Evandro Avellar** (MD), kaj lia filo **Yanni Avellar** (C) kunfratiĝas kun junulo **Felipe Duarte**, el LBV.

"Ekumenismo estas la universala deziro vivi Pace", inspiritan de la pensmaniero de la gvidanto de tiu Institucio.

Spektinte la prelegon de LBV, la instruisto kaj poeto **José Saraiva Matos**, el Salvadoro/Bahio, reliefigis por la Radielsenda Superreto Bona Volo*: *"La partopreno kune kun LBV, en iu ajn kunveno, estas tre grava, ĉar la mesaĝo, kiun diskonigas nia Frato Paiva Netto estas tre utila. Tio okazas, ĉar ni vivas en mondo kun multaj perfortoj, kun multaj komplikaĵoj; ni konstatas ke la homa malboneco estas tre diskonigata".*

Kaj li aldiris: *"Ni konas ke delonge LBV faras tiun laboron ne nur en Brazilo, sed en eksterlando, tiel ke la vorto de Jesuo, predikata de Frato Paiva Netto kaj liaj kunlaborantoj, iras tre malproksime. Ni havas plenan konvinkiĝon, ke la tasko estas malfacila kaj ke kelkfoje la homaro havas malfacilecon fari Bonon. Tamen gravas, ke oni persistu".*

Frekventantino de la Templo de Bona Volo (TBV), kiu situas en la brazila ĉefurbo, la instruistino de Esperanto **Maria das Dores Goes**, el Braziljo/Federacia Distrikto, reliefigis la etoson de tiu Monumento: *"Ĝi plaĉas al mi, kaj mi ĝin rekomendas! En TBV ŝvebas ia paco. Ĝi havas ian energion, ĉefe, en tiu Spiralon, kiun mi rekomendas [...]. Mi loĝas en Braziljo, mi jam plurfoje vizitis ĝin, kaj kiam iu ajn vizitas min, mi lin kondukas tien pro la jenaj kialoj: pro la energio, pro ĝia beleco, pro la agado de Legio de Bona Volo kaj pro la fakto, ke ĝi estas unu el la turismaj lokoj de la ĉefurbo de Brazilo. Do ne eblas, ke iu ajn turisto ne vizitu tiun lokon, kiu estas determinita loko en la turisma informilo de la ĉefurbo de Brazilo".*

Ankaŭ loĝanta en la brazila ĉefurbo, esperantisto **Sérgio Neri da Mata** raportis iom pri sia rilato al Legio de Bona Volo: *"Mi konas LBV-on de multaj jaroj, ekde kiam mi loĝis en Rio-de-Ĵanejro. Mi estas rio-de-ĵanejrano, kaj mia patro ofte aŭdis Fraton* ***Alziro Zarur*** *[karmemora fondinto de tiu Institucio] per radio. Mi estis infano, 6 aŭ 7jara, kaj mi jam aŭdis lin, ĝis kiam mi estis 15-jara, kiam mi venis al Braziljo. [...] Kiam mi vizitas la Templon [de Paco], mi sentas min pli vigla, por alfronti la problemojn, kiujn ni travivas".* ●

* Superreto Bona Volo pri Komunikado — Konsistas el la *Radielsenda Superreto Bona Volo*, *TV Bona Volo*, *Reto Edukado kaj Estonteco de Televido — Reeduki*, *Portalo Bona Volo* kaj la publikaĵoj pri Ekumena Spiriteco. Ĉiuj tiuj aŭdvidaj kanaloj (en la portugala) estas alireblaj per www.bonavolo.com.

# Esperanto-TV en Aŭstralio

## Debutis en Sidnejo la sola kanalo de IPTV en la mondo en la internacia lingvo

Laŭ informoj de Aŭstralia Esperanto-Asocio

*Esperanto-TV* (ETV) estas la plej nova televidkanalo, kiu elsendas interrete, kaj estas alirebla en la tuta mondo per iu ajn aparato, alivorte, per televidiloj kun alirkapablo por la reto, komputiloj, tabulkomputiloj kaj poŝtelefonoj (kun la mastrumsistemoj Android aŭ iOS).

La enhavo estas elsendata precipe en Esperanto, kaj ĝia ideo estas disvastigi allogajn programojn, ĉu originalajn, ĉu dublitajn, kaj ankaŭ videojn kreitajn de kontribuantoj el la tuta mondo. Ĝia ĉefcelo estas liveri altkvalitan enhavon al ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo, sendepende de ilia lingvokompreno.

*Esperanto-TV* rezultis el la kunlaboro inter Language Festival Association kaj la aŭstralia komunikfirmao iStreamStudios. **Richard Delamore**, reprezentanto de la direktistaro de ETV, informas, ke la projekto naskiĝis por *"servi kaj kreskigi la esperantan komunumon ĉirkaŭ la mondo, kaj ankaŭ provizi al ne--esperantistoj enrigardon en ĉi tiun unikan komunumon"*.

La videoj produktitaj de Legio de Bona Volo estas haveblaj ankaŭ ĉe ETV per la kanalo *Televido Bona Volo*. Tiu spaco estis donacita pro iniciato de s-ro **Robert Poort** (Usono), granda aktivulo en la Esperanto-movado kaj bonvola amiko.

Korespondante kun la Departemento pri Esperanto de LBV, li skribis en majo, 2014: *"ETV jam bone progresas. Ni nun ankoraŭ prezentas nian ĉiutagan programon per ludlisto, sed baldaŭ ni prezentos pli realan televidon al la Esperantistaro. La ETV-teamo diligente laboras por realigi siajn planojn kaj tre aprezas la bonegan laboron de LBV!"*.







Fotoj: Reprodukto BV

Enŝutu *QR Code* en vian komputiltelefonon, fotu la kodon kaj spektu *Esperanto-TV* aŭ aliru: http://esperantotv.net. Ankaŭ Vi aliru nian kanalon!

# Bona Volo en la monda gazetaro

## Mesaĝo de LBV elstaras en la plej tradiciaj esperantaj periodaĵoj

Per la titolo "Giganta brazila institucio adoptas Esperanton kiel laborlingvon", la oficiala revuo de Universala Esperanto-Asocio publikigis, per sia junia eldono, 2014, artikolon pri Legio de Bona Volo. La iniciato venis de la ĉefredaktisto de tiu periodaĵo, **Fabrício Valle**, iama redaktisto de la revuo *Brazila Esperantisto*.

La artikolo prezentas panoramon pri la laboro disvolvata de la Institucio en Brazilo kaj eksterlando kaj reliefigas: *"Fundamentita sur spirito de kunlaboro, la agado de LBV sin gvidas per speciala rigardo al la familio kaj al ĝia efektiva partopreno en la socio. Ĉiuj ĝiaj iniciatoj strebas al la plena praktikado de la planeda solidareco kaj ekumenismo, kiuj kunigas kredojn, nekredojn, tradiciojn, etnojn ktp, kiuj ordinare rolas kiel faktoro de apartigo inter la homoj".*

La raporto aldiras: *"De sia fondiĝo LBV rekonas la gravecon de Esperanto, ĝin uzas kiel laborlingvon kaj ĝin rekomendas al ĉiuj per plej diversaj komunikiloj".*

### "Paiva Netto: pensulo de la nuntempo"

Alia periodaĵo inter la plej antikvaj kaj prestiĝaj estas *Heroldo de Esperanto*. Fondita en 1920, ĝi diskonigas agojn kaj temojn interesajn al la tuta Esperantujo, ĉiun trian monaton.

Artikoloj de verkisto Paiva Netto elstaris en kelkaj el ĝiaj numeroj dum la jaro 2013. Ekde tiam, la ĵurnalo publikigas periode tekstojn de tiu aŭtoro, kiuj pritraktas ĉiutagajn temojn laŭ la vidpunkto de la Evangelio-Apokalipso de Jesuo, la Ekumena, do Universala Kristo, kaj ankaŭ mesaĝojn pri plivalorigo de la Vivo.

Sur la kovrilo de unu el siaj numeroj, la ĵurnalo difinis verkiston Paiva Netto kiel unu el la *"pensuloj de l'nuntempo [kiu] ricevas multe da spaco ĉi-numere"*. Koncerne la kontribuon donatan de la Institucio al la Esperanto-movado, la ĵurnalo emfazis, ke *"efektive ĝi estas fenomeno interna al la E-mondo, kaj tial ĝi meritas foje atenton"*.




▶ Reproduktaĵo de la artikolo pri LBV publikigita en la revuo *Esperanto*, junia numero, 2014.

En la reliefo la artikolo "Ĉiu tago estas Tago de Infanoj", publikigita kune kun foto pri la Eduk-Instituto José de Paiva Netto, en Sanpaŭlo, Brazilo.







Fotoj: Reprodukto BV

# Esperantista Itinero

La Eduka Ensemblo Bona Volo akceptas Esperantistojn el Bulgarujo kaj Nepalo







Fotoj: Felipe Tonin



**Videoj**

Spektu tiujn kaj aliajn ĉefmomentojn de la vizito per nia kanalo ĉe Jutubo. Ĉion ni filmis, por ke vi eksciu pri la aktualaĵoj! Venu ankaŭ vi ekkoni LBV-on!

Post la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, en Bonaero, esperantistoj profitis la okazon por inkluzivi Brazilon en sian sud-amerikan itineron, kiel faris pedagogiistino **Antoaneta Nikolaeva** kaj ĵurnalistino **Rosiĉa Valĉanova**, ambaŭ el Bulgarujo. Ili vizitis la urbon Sanpaŭlo kaj ekkonis, la 8-an de aŭgusto 2014, la Edukan Ensemblon Bona Volo, kiu konsistas el la Eduk-Instituto José de Paiva Netto kaj la Supervartejo Jesuo.

Vizitante la plurajn sekciojn de la lernejo, kiel la salonojn por dancado kaj karateo, ludilejon, lernoĉambrojn, komputadan laboratorion ktp., ili alvenis en la Kultura Salono Idalina Cecília de Paiva, kaj estis omaĝitaj de Muzikistaro Bona Volo, kiu konsistas el malriĉaj junuloj asistataj ĉe la lernejo de LBV.

La vizitantinoj dankis la omaĝon kantante tipan bulgaran kanton. *"Mi estas tre forte impresigita de la varma akcepto, de la amikeca*

Jéssica Botelho




En la okazaĵo, la vizitantoj parolis kun la pedagogiistino Suelí Periotto (meze), direktorino de la Eduka Instituto José de Paiva Netto kaj gvidanto de la pedagogia metodo de tiu Institucio.

*etoso, kiu regas ĉiun lokon. Ne gravas kie, ĉu ĉe kun la infanoj, ĉu kun la adoleskantoj, ĉu kun la funkciantoj"*, komentis pedagogiistino Antoaneta en intervjuo al la Superreto Bona Volo pri Komunikado.

Ĵurnalistino Rosiĉa ankaŭ registris siajn impresojn: *"Mi estas surprizita, tre grande surprizita de tiuj kondiĉoj, kiujn mi vidis en tiu lernejo"*. Kaj ŝi elektis la vorton Amo por sintezi la tutan laboron, kiun ŝi observis, celantan helpi malriĉan komunumon.

## "La gelernantoj de LBV kontribuos al bonstato de la homaro"

La 15-an de aŭgusto siavice vizitis la centran sidejon de LBV la bankoficistino **Indu Devi Thapaliya**, prezidantino de Nepala Esperanto-Asocio, kaj profesoro **Bharat Kumar Ghimire**, ĝenerala sekretario de tiu organizo.

Niaj gesamideanoj atestis la aplikadon de la noviga pedagogia linio kreita de edukanto Paiva Netto — formita per la Pedagogioj de Amo kaj de la Ekumena Civitano — kiu rigardas edukatojn per *"transintelekta vidado"*, kiel reliefigas ĝia kreinto.


Intervjuate de la Superreto Bona Volo pri Komunikado, s-ino Indu deklaris sian feliĉon pro la vizito: *"Mi delonge aŭdis pri [Legio de] Bona Volo per reto. Mi nun estas tre feliĉa, ke mi korpe ĉi tie alvenis, kaj ĝuis kun tiu bela loko. [...] Kaj mi ankaŭ ĝuis la skribadon de Paiva Netto, kaj la skribado, kiuj li diris, kiu estis bona por fari bonon al la mondo. [Legio de] Bona Volo ankaŭ estas bona por la tuta mondo"*.

Por s-ro Bharat, iri persone al LBV firmigis lian koncepton pri la celo de la Institucio eduki per Ekumena Spiriteco*, ĉar li komprenis ĝin per praktika aplikado: *"Ĉiuj kredantoj havas lokon en ĝi, kristanoj, budhistoj, mahometanoj, ĉiuj havas lokon, eĉ ateistoj havas lokon en ĝi. [...] Mi estas ege influita, kaj kontenta aŭskultante kaj sciante la celon de [Legio de] Bona Volo. Fakte la infanagadoj ĉi tie multe impresis al mi. [...] Do produktado de tiu ĉi lernejo estas do tre klara estonteco. Gestudantoj post la studado de tiu ĉi lernejo, ili povas iri al diversaj kampoj, kaj kontribui por Bono de la homaro. Mi eklernis multe, multon hodiaŭ. Organizaĵoj kiel LBV ludas gravan rolon por plibonigi la socion"*.

Ankaŭ vi vizitu la Edukan Ensemblon Bona Volo! Ĝi situas en Sanpaŭlo, Brazilo, ĉe Av. Rudge, n-roj 630 kaj 700 – Kvartalo Bom Retiro. Pliaj informoj haveblas per la Portalo Bona Volo kaj/aŭ per la retadreso esperanto@bonavolo.com.

*Ekumena Spiriteco — Tiu standardo de Legio de Bona Volo ĉeestas en ĉiuj ĝiaj sociedukaj agadoj, ĉar ĝi estas komprenata kiel *"lulilo de plej karaj valoroj naskiĝintaj el la Animo, la nesto de emocioj kaj de la racio prilumita de intuicio, la medio kiu envolvas ĉion kio transcendas la vulgarecon de materio kaj originas el la sublimigita homa sentemo, kiel Vero, Justeco, Kompatemo, Moralo, Etiko, Honesteco, Grandanimeco kaj Frata Amo"*. Elprenaĵo de la libro *Urĝas Reeduki!* (verkitan de la edukanto Paiva Netto), kiu fundamentas la edukan gvidlinion de LBV.








# Literaturo por ĉiuj aĝuloj

Aĉetu la furoraĵon "Meditadoj el la Animo", de la brazila verkisto Paiva Netto.

**Skribu al esperanto@bonavolo.com**






# "Libro, kiu riĉigas la animojn"

Esperanto estas unu el la tre gravaj kulturaj aspektoj de Legio de Bona Volo, asertas ĝia direktoro-prezidanto, José de Paiva Netto, per sia artikolo "Ekumenismo de Koroj kaj Esperanto". Per ĝi eblas rompi barojn, multfoje starigitajn pro lingvaj aferoj: *"la lingvo jam ne estas baro kontraŭ elmontro de niaj konceptoj kaj praktikado de solidareco, kaj tio prezentas en Ekumenismo de Koroj decidan faktoron por tutplaneda kunfratiĝo"*, aldiras la aŭtoro.

Ekde la lanĉo de sia esperantlingva eldono, la furora libro *Meditadoj el la Animo*, verkita de Paiva Netto, estas vaste diskonigata kaj rekomendata en la tutmonda Esperanto-komunumo. Pli ol 400 mil ekzempleroj de tiu verko jam vendiĝis en Brazilo kaj Portugalujo, kaj ĝi ricevis distingon ĉe la ĉefaj literaturaj eventoj tra la mondo. Por la esperantlingva versio skribis antaŭparolon pola esperantisto, ĵurnalisto kaj dokumentfilmisto **Roman Dobrzyński**.

En 2014, psikologiisto, bibliotekisto kaj eksprofesoro **Georgi Mihalkov**, el Sofio, Bulgarujo, faris gravan recenzon pri tiu literaturaĵo por la revuo *Bulgara Esperantisto*, titolitan "Libro, kiu riĉigas la animojn". Krom esti la redaktisto respondeca pri tiu periodaĵo, li estas ano de la Esperanta PEN-Klubo kaj de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj. Ĉi-sekve ni ĉerpas partojn el lia bela recenzo:

"Nun dank' al Esperanto mi havis eblecon tralegi lian libron *Meditadoj el la Animo* kaj mi estas feliĉa, ke pere de tiu ĉi rimarkinda verko mi konatiĝis kun aŭtoro, kiu ne nur amas la homojn, zorgas pri la edukado kaj la spirita vivo de gejunuloj, sed estas verkisto kaj filozofo, kiu profunde esploras la plej grandajn kaj gravajn problemojn de la homa ekzisto.


"Por Paiva Netto la ĉefa celo de la homaro estas la paco, sed li avertas, ke *'la vera paco naskiĝas*

Persona arkivo



"Paiva Netto instruas nin esti kuraĝaj. La kuraĝo donas fortojn, esperon kaj volon venki la malfacilaĵojn. (...) *Meditadoj el la Animo* instigis min mediti pri la plej gravaj problemoj de la homa vivo kaj de la universo: la paco, la amo, la demokratio, la spirito, la materio..."

Legu tiun recenzon kaj aliajn ĉe la Portalo Bona Volo. Kaj nepre aĉetu vian ekzempleron!




*unue el la pura koro de homo'*. Tamen por ke la homa koro estu pura, en ĝi konstante devas nesti la amo. La aŭtoro diras: *'La vizaĝo de Dio estas Amo. Ju pli ni amas, des pli Li manifestiĝas en ni'*. Paiva Netto detale analizas la Amon. Li emfazas, ke nur la vera amo liberigas nin de la katenoj de malprudento, kiu kaŭzas la psikajn, korpajn kaj sekve sociajn malsanojn.

"La verkisto esploras diversajn problemojn de la homa vivo. Li opinias, ke unu el la danĝeroj, kiujn la homaro trapasas estas la vulgarigo de la suferoj. *'Post tiom longa rigardado de suferoj per la bezonataj komunikrimedoj, parto de la popolo komencas supozi, ke tio estas neŝanĝebla afero.'* Paiva Netto instruas nin esti kuraĝaj. La kuraĝo donas fortojn, esperon kaj volon venki la malfacilaĵojn. Paiva Netto citas la grekan filozofon **Plutarko**, kiu diras: *'Vere kuraĝa homo ne serĉas danĝerojn. Li alfrontas ilin'*.

"Por Paiva Netto la Fido je Dio, kune kun bonaj agoj, estas tre grava por la homa vivo. La Fido devas esti firma kaj kiel diris **Marteno Lutero**: *'Savo dependas ekskluzive de fido je Dio'*. En tiu ĉi riĉenhava libro pluras la gravaj temoj, kiujn traktas la filozofo Paiva Netto. Unu el ili estas la demando pri demokratio kaj la aŭtoro konstatas, ke la demokratio estas respondeco esprimi opiniojn boneduke sen emo al kverelo.

"Paiva Netto argumentite pruvas, ke materio estas spirito. *'Necesas do konkludi, ke Spirito kaj kreo de Filo, kiu esprimiĝas en la Naturo per planeda materio, ankaŭ estas Unu, tio estas, ili havas la saman spiritan devenon.'*

"*Meditadoj el la Animo* instigis min mediti pri la plej gravaj problemoj de la homa vivo kaj de la universo: la paco, la amo, la demokratio, la spirito, la materio… La aŭtoro posedas grandan intelekton kaj riĉan kulturon. Li trastudis la vivon kaj sciencan agadon de pluraj mondfamaj filozofoj, sciencistoj kaj verkistoj. En la libro estas detalaj biografiaj kaj bibliografiaj notoj pri ili. Paiva Netto ne nur citas iliajn verkojn, sed analizas iliajn sciencajn konceptojn pri la vivo, Dio, la mondo kaj universo." ●



Jean Carlos

# Templo de la Dia Ekumenismo

**Sub la komando de Paiva Netto, pli ol 100 mil homoj partoprenis la celebron pri la 25-jariĝo de la Templo de Bona Volo, elsenditan al pli ol 2 mil radiostacioj enlande kaj alilande.**

Je la 8-a de novembro 2014, miloj da homoj kuniĝis ĉe la Placo de Paco*, en la Ekumena Ensemblo de la Templo de Bona Volo (TBV), en la brazila ĉefurbo, por partopreni la celebradon de la 25-jara jubileo de tiu monumento, kune kun ĝia fondinto, José de Paiva Netto. Ĉeestis grupoj alvenintaj el sennombraj urboj de la mondo, konsistantaj el ĉiugeneraciaj homoj, kiuj sin preparis dum la tuta jaro por tiu okazaĵo.


Tiu renkontiĝo estis kulmina momento de la festo, kiu komenciĝis je la 1-a de oktobro, kaj invitis ĉiujn por "Nova Alianco kun Dio", laŭ kiu ĉiu pilgrimanto siamaniere renkontis la Kreanton .


Vivian R. Ferreira

Sheyla Sampaio

Por tiel granda evento, leŭtenantino-kolonelo **Sheyla Sampaio**, komandanto de la 1a Bataliono de






Vivian R. Ferreira

Paiva Netto lanĉis la literaturan verkon *Jesuo, Doloro kaj la deveno de Lia Aŭtoritateco*, kvina volumo de la kolekto *Apokalipso de Jesuo por la Kore Simplaj*.

la Militista Polico en la Federacia Distrikto, substrekis la gravecon pri sekureco kaj diris dum intervjuo: *"Tre kontentigas nin tio ke mirinda okazaĵo kiel tiu de LBV venigas al ni nur bonajn rezultojn. (...) La kvanto da pilgrimantoj kiuj vizitis la Templon de LBV, dum la datrevenfesto, superis la ciferon de 100 mil homoj"*.


Ekde sia inaŭguro je la 21-a de oktobro 1989, la Templo de Bona Volo jam plibonigis la vivon de milionoj da homoj, kiuj al ĝi pilgrimis kun granda Fido kaj fervoro. Tie, ili serĉis eksenti la ĉeeston de Dio kaj de la Lumaj Spiritoj, Benataj Animoj, kaj petegi kaj danki.

Laŭ la diro de multaj ĉeestantaj pilgrimantoj, tiu evento markis la komencon de nova jaro en siaj vivoj. Programon estis speciale dediĉita al celebrado de la Arĝenta Jubileo de TBV. Okazis diversaj aktivecoj, kiuj allogis la atenton de la publiko, kiel diskutoj kaj ekumenaj studoj surbaze de la Evangelio-Apokalipso de

Ĉu vi jam spektis nian filmdokumenton pri la Templo de Paco? Fotu la kodon kaj eksciu pli pri tiu Monumento.

*** Placo de Paco** — Situas fronte al la Ekumena Ensemblo de Bona Volo, kiu konsistas el la Templo de Bona Volo (TBV) kaj la Monda Parlamento de Ekumena Frateco (ParlaMundi de LBV).

Lucian Fagundes




Thiago Mendes

Reliefe, la fondinto de TBV ĵetas Magnetizitan Akvon kaj rozpetalojn sur la ĉeestantojn.



Vivian R. Ferreira



Vivian R. Ferreira



Thiago Mendes

Jesuo por malsamaĝaj homoj kaj la prelego *Reenkarniĝo: pro la Amo de Dio, la rerenkontiĝo de Animoj* kaj *Problemoj en familio: kiel venki ilin ne kreante aliajn?.* Sub diversaj muzikstiloj, la publiko akompanis ankaŭ la *Spektaklon Legiana Muziko – La Arto Venki kun Jesuo,* per prezentado de kanzonoj, kiuj emocias kaj memorigas la kulturon kaj la historion de la Institucioj de Bona Volo (IBV--oj), kaj tradukas la ekzemplojn lasitajn de la Kristo de Dio al ĉiuj popoloj.

## Solena Sesio

Gvidante la Solenan Kunsidon de la Arĝenta Jubileo de la Monumento, la elpensinto kaj fondinto de la Templo de la Dia Ekumenismo legis por la ĉeestantoj elprenaĵon de sia nova verko, lanĉita en la okazo, *Jesuo, Doloro kaj la deveno de Lia Aŭtoritateco,* per kiu li profunde analizas la temon "Doloro", inspirita de la kruelaj provoj travivitaj kaj venkitaj de la Kristo de Dio. La aŭtoro klarigas ke: *"En ĉi tiu verko, Vi, kara legantino, estimata leganto (plenkreska,*

*maljuna, juna kaj infana, aŭ eĉ loĝantoj en la Spirita Mondo, kiuj ĉion vidas), trovos longan eseon pri Doloro, neniam ĉi tie prezentita kiel fatalo. Mi prezentas miajn pripensojn pere de la eksterordinara ekzemplo de la Kristo; sekve, ne por nia malvenko en malvigliĝo,* ***sed cele al venko, konsiderante ke mi kapabligas vin preni eĉ turmenton, kaj per ĝi levi kuraĝon.*** *(...) Mia intenco do estas montri al Vi, ke* ***la Doloro nin fortigas kaj nin instruas*** *venki ĉiajn barojn, eĉ plej akrajn. (...)* ***Transpasi malbonsorton estis unu el la plej grandaj lecionoj, kiujn Li transdonis al ni****".*

Post sia prediko, li paŝis sur la pasejo, inter la popolo, realigante la Spiritan Bapton de infanoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj. Ĵetante Magnetizitan Akvon kaj rozpetalojn sur la popolamason, la fondinto de la Templo de Paco benis la ĉeestantajn pilgrimantojn, kronante la eventon.

Se vi ne povis ĉeesti la celebradon pri la datreveno de la Templo de Bona Volo en la jaro 2014, do alvenu en la proksimaj jaroj kaj eksentu la vibradon de Paco kaj Bona Volo de la plej ofte vizitata Monumento en la ĉefurbo de Brazilo, laŭ datumoj de la Ŝtata Sekretario pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur-DF).

**Adreso:** SGAS 915, Lotes 75 e 76 — Brasília/DF — Brazilo. **Telefono:** (+55 61) 3114-1070. **Horo:** malfermita la tutan diurnon. **Informoj:** <www.tbv.com.br/esperanto>.

Rick Abreu



Ĝoje kaj entuziasme, pilgrimantoj el sep landoj partoprenis en celebraj aktivadoj de la Arĝenta Jubileo de la Templo de Bona Volo.

Persona arkivo



Vivian R. Ferreira

Plastika artistino Anneke Schouten-Buys kun sia skulptaĵo, donacita al TBV omaĝe al la monumento.

## Donaco el Nederlando

Plastika artistino **Anneke Schouten-Buys** sendis rekte el urbo Apeldoom, Nederlando, belegan artaĵon de ŝi mem skulptitan, piramidforman, faritan el steatito omaĝe al la Piramido de Paco. *"Piramida templo estas bela admono al unueco"*, klarigas la artistino. La verko estis plusendita al la Templo de Bona Volo, kie ĝi estos ekspoziciata kune kun la ceteraj donacoj.

Felipe Duarte



# 99-a UK

## Esperanto-Tago malfermas la Universalan Kongreson en Bonaero

Post precize 127 jaroj da ekzistado, celebritaj la 26-an de julio 2014, la internacia lingvo daŭre montras sian viglecon kaj praktikecon. Unu el la pruvoj estas la serio de mondkongresoj, kiuj kunvenigas ĉiujare la Esperanto-

komunumon por analizi la defiojn, progresojn kaj disvastigon de la lingvo.

En 2014, kun la apogo de la Argentina Kultur-Ministerio, Bonaero gastigis la 99-an Universalan Kongreson de Esperanto, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Okazis semajno plena de prelegoj, konkursoj, administraj kunsidoj, kursoj, sporteventoj, oficialaj ekzamenoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaj ankaŭ debatoj kaj kulturprezentadoj pri la temo "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco".

Tiuokaze, Legio de Bona Volo aktive partoprenis la Esperanto-eventon kaj vaste dokumentis ĝin per fotoj, videoj kaj intervjuoj, kiujn oni povas aliri ankaŭ per la oficiala paĝo de Portalo Bona Volo ĉe Fejsbuko. La Institucio prezentis pacmesaĝon ĉe sia budo, en kiu estis ekspoziciataj pluraj publikaĵoj, interalie la furora libro *Meditadoj el la Animo,* aŭtorita de verkisto Paiva Netto.

La unua kongresano vizitanta la budon de LBV, advokato **Carlos Miranda**, el Peruo, insistis registri sian admiron al LBV: *"Mi konis LBV-on en la jaro 1987, proksimume. Mi havis la grandan honoron koni*


Arkivo BV

De maldekstre dekstren: s-ro **Petâr Todorov**, prezidinto de Bulgara Esperanto-Asocio; **Rubén T. Diaconu**, ĉefredaktisto de la revuo *SEK-Bulteno*, el Argentino; Felipe Duarte, el LBV; kaj la instruisto **Carlos Antonio Stacul**, el Argentino.


Arkivo BV

Brazila esperantisto **Ciro Gomes de Freitas** (MD) ankaŭ vizitis la budon de LBV.

Ĉu vi ne povis partopreni la kongreson aŭ deziras rememori ĝin? Spektu la videon, kiun ni pretigis por vi.

"Mi alte estimas la ideon de ekumena laboro, la tuta idealo ke Dio estas esenca ingredienco kaj la omega portego kio estas necesa por la homa paciĝo kaj la homa amo."

Wally du Temple, el Toronta Universitato, Kanado

Felipe Duarte




Profesoro **Wally Du Temple**, el Toronta Universitato, Kanado, salutis tre simpatie la reprezentantinon de LBV, Maria Aparecida da Silva.

Arkivo BV



Advokato **Carlos Miranda** (C), el Peruo, kunfratiĝas kun la reprezentantoj de la Institucio ĉe la evento.

"Por mi estas ankaŭ speciala plezuro ĉeesti kaj havi kontakton kun la reprezentantoj de Legio de Bona Volo, ĉar mi scias ke tiu Institucio plenumas belegajn funkciojn por la interkonatiĝo de la homoj, por la paco, por komunaj kontaktoj kaj helpo unu al aliaj por la homoj kaj prepari bazon por bela homa estonteco."

Petar Todorov,
prezidinto
de la Bulgara
Esperanto-Asocio

*s-ron José de Paiva Netto, ke mi konis en San-Paŭlo. [...] Tio estis tre granda okazo por esprimi al la LBV mian koran saluton kaj dankecon pro la belegaj momentoj ke mi restis en via lando. Ankaŭ mi volas gratuli pro la grava laboro fare de li. Krom tio, mi scias ke LBV faras mirindan laboron por infanoj. Gratulon!"*

Ankaŭ troviĝis je publika dispono la porinfanaj libroj *En la betesda lageto* kaj *Sanigo de paralizulo*, el la ekumena kolekto "La mirakloj de Jesuo", krom la revuo *Paco por la Jarmilo* kaj faldfolioj pri la Templo de Bona Volo. La libroj destinitaj al la infana publiko kaptis ne nur la atenton de infanoj kaj iliaj gepatroj, sed ankaŭ tiun de edukistoj kaj de aliaj profesiuloj instruantaj Esperanton, kiel ekzemple Brazila bestkuracistino **Cristina Claudia**, kiu aĉetis la materialon por kunmeti sian bibliotekon kaj helpi disvolvi la pedagogian enhavon de porinfanaj lecionoj en sia loĝurbo.

La reprezentantoj de LBV

rerenkontis sian karan amikon kolonelo **Kanjo Kanev**, el Bulgarujo, kiu, tre emociita, deklaris en intervjuo al nia skipo ĉe la kongreso: *"Mi sentas ke mia vortaro estas malriĉa por esprimi mian estimon al Legio de Bona Volo, al la esperantistoj de Brazilo. Niaj rilatoj datumas de kelkaj jaroj"*.

Brazila esperantisto **Ciro Gomes de Freitas** rakontis sian rilaton al la Institucio, kiun li konas ekde infanaĝo. *"Mi volas gratuli LBV-on. Ni scias, ke ĝi naskiĝis malgranda, kaj hodiaŭ estas vastega institucio, kiu gravege laboras por fundamenta edukado, kaj ankaŭ en mia kampo, kiu estas edukado. Mi estas esperantisto ekde la 1970-aj jaroj. Kaj la laboro farata de LBV per Esperanto estas alia tre grava afero, ne nur por LBV mem, sed ankaŭ por la plifortigo de Ekumenismo."* ●

"Mi vere gratulas la laboron de LBV pro disvastigado de Esperanto kaj pro la antaŭeniro de tiuj ideoj kiuj estas universalemo en la tuta mondo, interkompreniĝo inter la popoloj, kaj amo, ĉefe amo inter la homoj. Mi vere dankas vin."

Emílio Cid, ĉefdelegito de UEA por Brazilo

"Estas granda ĝojo por mi trovi samideanojn kiuj laboras en LBV, kiuj mi jam konas delonge pere de la reto kaj ankaŭ pere de kontaktoj kun samideanoj el Brazilo."

Rubén Diaconu, ĉefredaktisto de la revuo *SEK-Bulteno*, el Argentino

BONVOLA AMIKO

## Andrzej Grzębowski revenas al la Spirita Patrujo

Je la aĝo de 71 jaroj, la elstara pola esperantisto **Andrzej Grzębowski**, prezidanto de *Esperantotur*, transiris al la Spirita Patrujo la 8-an de aŭgusto, en la urbo Bonaero. Legio de Bona Volo kaj ĝia direktoro-prezidanto, José de Paiva Netto, sendas siajn plej sincerajn vibrojn de Paco al la Eterna Spirito de nia samideano, inkluzivante ĉiujn liajn familianojn kaj amikojn.




Felipe Duarte

Dum la evento, s-ro Andrzej Grzębowski vizitis la budon de Legio de Bona Volo kaj rerenkontis siajn amikojn el tiu Institucio.





# ĈU NI SUKCESIS?

**De la Redakcio**

La ĉi-supra titoldemando estas la temo de la jubilea Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio, en januaro 2015. Bone elektita temo, taŭge starigita demando. Ĝi estas fakte trafe provoka kaj pensiga. Kiuj estas "ni"? Sukcesis kion? Kion oni povas konsideri "sukceso"? Pri kiu periodo oni demandas: ĉu pri la periodo de la brazilaj kongresoj aŭ pri la tuta historio de Esperanto-movado en Brazilo?

Indas komence konsideri, ke Esperanto vivas en Brazilo jam de pli ol unu jarcento. Estas registro de esperantistoj en nia lando jam fine de la 19-a jarcento – Francisko Waldomiro Lorenz estis probable la unua. La unua Esperanto-klubo fondiĝis en la urbo Campinas, en 1906. La unua Brazila Kongreso de Esperanto okazis en 1907 kaj tiam fondiĝis Brazila Esperanto-Ligo (BEL). Kvindek kongresoj sub la aŭspicio de Brazila Esperanto--Ligo signifas, ke en multaj jaroj ili ne okazis. Tio estis malfacila tempo por nia tutlanda institucio, sed oni ne povus konsideri ĝin kiel ne tiel efikan, ĉar dum signifoplena parto de tiu tempo Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kun sidejo en Rio, iniciatis la epokfarajn Seminariojn de Esperanto, kiuj iel anstataŭis la BEL-eventojn en la lasta duono de la 20-a jarcento.

Dum tiu longa tempo, paroli pri sukceso, malsukceso aŭ nesukceso estas ĉiam tre relative. Ekzemple, Brazilo estis la unua lando en la mondo, kie la Poŝto akceptis oficiale Esperanton kiel "klaran lingvon" por komunikado.


Esperanto-net

> Indas festi, celebri kaj gratuli la brazilan Esperantistaron! Indas rigardi la estontecon kun esperplena koro. Multo ankoraŭ restas farenda, sed la historio montras, ke ni havas energion kaj fidon pri nia vojo.

Se ni konsideras, ke ankoraŭ vasta kvanto da brazilanoj eĉ ne scias kio estas Esperanto, ni povas taksi tiun fakton kiel malsukceson; se ni konsideras, ke Esperanto-komunumo senĉese aktivas en nia lando de pli ol unu jarcento, jen sukceso.

Se ni konsideras, ke multaj el niaj samideanoj ankoraŭ ne kontentige regas la lingvon kaj ligiĝas al ĝi prefere per la allogo de idealismo kaj interna ideo, jen en tio nesukceso; se ni tamen konsideras, ke centoj da homoj ĉiujare partoprenas Esperanto-eventojn – ĉu tutlandajn, ĉu ŝtatajn, ĉu regionajn, ĉu urbajn – jen do sukceso.

Se ni konsideras la modestecon de Esperanta libromerkato en nia lando, jen afero kiu povas esti pli bone esplorata; se oni konsideras, ke dum tiu jarcento multaj libroj estis eldonitaj, fare precipe de Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj de Brazila Esperanto-Ligo, pri kaj en nia lingvo – jen sukceso.

Se ni konsideras, ke malmultaj el tiuj finintoj de kursoj starigitaj de diversaj gravaj edukaj institucioj – precipe universitataj – fariĝas aktivaj en nia movado, jen nesukceso; se ni konsideras, ke tiu laŭdinda iniciato ankoraŭ okazas en lernoĉambroj, jen sendube sukceso.

Se ni konsideras, ke la ĉeesto de brazilaj samideanoj en internaciaj eventoj limiĝas al etaj karavanoj – jen relativa nesukceso; se ni konsideras, tamen, ke Brazilo jam akceptis du Universalajn Kongresojn de Esperanto (Braziljo 1981 kaj Fortalezo 2002) kun granda entuziasmo de la partoprenintoj – jen nepra sukceso.

Se ni konsideras la kvanton da homoj, kiuj efektive uzas la servojn de Brazila Esperanto-Ligo, jen plia okazo por plibonigo; se ni konsideras, ke ĝi havas unu el la plej grandaj kaj valoraj Esperanto-bibliotekoj kaj libroservoj en la mondo – jen, certe, sukceso.

Se ni konsideras, ke la tutan laboron ĉe Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) plenumas manpleno da sindediĉaj volontuloj, preskaŭ sen efektiva subteno de la tuta samideanaro, jen nesukceso; se ni konsideras, ke EASP ĵus gajnis premion de Universala Esperanto-Asocio kiel unu el la plej bone organizitaj lokaj Esperanto-institucioj en la mondo – jen brila sukceso.

Se ni konsideras, ke en Rio regule funkcias unuhora radiprogramo pri Esperanto, kiu atingas milojn da homoj, jam de multaj jaroj (Radio Rio de Janeiro) – jen nepra sukceso.

# Kiam UNESKO rekonis Esperanton

**Fabiano Henrique**
**fabhenrique@bol.com.br**


Jéssica Botelho

**Fabiano Henrique**
Niterói, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Esperantisto ekde 1997. Redaktoro de la programo *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, de Radio Rio de Janeiro.

Je la 10-a de decembro 2014, la tutmonda esperantista movado festis la 60-an datrevenon de la unua rezolucio de UNESKO favore al Esperanto. Tiu dato estas des pli rimarkinda, ĉar temas pri la unua oficiala agnosko de Unuiĝintaj Nacioj (UN) al la Internacia Lingvo. De tiam, Universala Esperanto-Asocio (UEA) ludas gravan rolon inter la neregistaraj organizoj, kiuj kunlaboras kun ambaŭ institucioj.

Kiel rezulto de tiu 60-jara rilato, UEA fariĝis pli respektata en la tuta mondo. Precize tiu ampleksa kultura protektado karakterizas ĝian rolon ĉe la UN-instancoj, kiel elstara kunaganto. Surbaze de tio, la Esperantistoj agadas je la kampo de lingva diverseco, rajto de komunikado, edukado kaj paco.

En la scenejo de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, efektiviĝinta en 1954, en la ĉefurbo de Urugvajo, elstaris la agado de la humanisto kaj juristo **Ivo Lapenna** (1909-1987), kiu estigis veran kampanjon lige kun la peticio al UN. Lia strebado estis kronita ne nur per la starigo de konsultaj rilatoj inter UEA kaj UNESKO, sed ankaŭ – kaj ĉefe – per la Rezolucio de Montevideo, kiuj kuraĝigis la membrojn-ŝtatojn alpreni kaj instrui la Internacian Lingvon en siaj teritorioj.

En la jaro 1985-a, UNESKO akceptis alian rezolucion favore al Esperanto. Ĝi denove rekonis la potencialon kaj atingojn de la uzado de la lingvo kreita de Zamenhof kiel instrumento por la internacia kompreniĝo.

Kvankam oni ne povas konsideri tian memorindan eventon la vera "Fina Venko", ĝia datreveno havas ne nur historian gravecon. Tial, dum la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero (Argentino), la prezidanto de UEA, **Mark Fettes**, proponis tutjaran festan programon. Kreiĝis do la jaro Montevideo 60, kiu fermiĝos per ora ŝlosilo en Lille (Francujo), okaze de la 100-a UK.

Se oni konsideras, ke, pro laboro de brazilano (Fabiano Henrique), jam de iom da tempo funkcias interreta informilo pri la Esperanto-movado kun interesa redaktado ("Esperanto Ilustrita – Virtuala Esperanto-revuo") – jen bonega sukceso.

Se ni konsideras la agadon de civitanaj organizaĵoj, kiuj uzas Esperanton por disvastigi siajn mesaĝojn al la tuta mondo; la agadon de radioj, kiuj simile laboras per amaskomunikiloj; la agadon de eldonejoj, kiuj per Esperanto dissendas librojn kaj ideojn al la mondo; la apogon de TV-elsendantoj al nia idearo; la formikan laboron de centoj da kluboj tra nia tuta lando, kiuj tenas brulanta la torĉon – ni povas konkludi, ke la listo da sukcesoj estas pli signifa ol tiu de malsukcesoj.

Indas festi, celebri kaj gratuli la brazilan Esperantistaron! Indas rigardi la estontecon kun esperplena koro. Multo ankoraŭ restas farenda, sed la historio montras, ke ni havas energion kaj fidon pri nia vojo. Tial, kiel kunlaboron, ni montris kelkajn ŝanĝo-aspektojn kiujn ni povas superi. Cetere, pli grave ol kalkuli sukcesojn kaj malsukcesojn estas daŭre labori. Ni plu sulku nian sulkon!

# Formado de planedaj civitanoj

## Metodologio de LBV kuraĝigas edukatojn konstrui plibonan socion

**Suelí Periotto**

Vivian R. Ferreira



Suelí Periotto estas gvidanto de Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano kaj direktoro de Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo (Brazilo). Ŝi estas magistro kaj doktoriĝanto pri Edukado en PUC-SP, preleganto kaj prezentanto de programo *Edukado sub Debato*, ĉe Supera Reto Bona Volo de Radio.

La pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo, kreita de la direktoro--prezidanto de la Institucio, la edukanto José de Paiva Netto, konsistas el la Pedagogio de Amo (direktata al infanoj ĝis 10-jaraj) kaj la Pedagogio de Ekumena Civitano (ekde 11-jaraj). Ĝia koncepto celas edukadon kiu kunigas valorojn etikajn, ekumenajn kaj spiritajn kun la pedagogiaj enhavoj de ĉiuj lernobjektoj de la instruprogramo.

La praktiko per distinga instruplano, proponita de la kreinto de tiu pedagogio, antaŭ jardekoj, estis disvolvita de instruistoj de la instrureto de LBV, alidire, MAPREI (portugale, Metodo por Lernado per Esploro Racia, Emocia kaj Intuicia), metodologio konsistanta el ses etapoj de agado dum la tuta planado de diversaj lernobjektoj de la baza instruado. Temas pri pedagogia ilo por ebligi la efektivan partoprenon de infanoj kaj






João Periotto

## Akorde kun la juneca universo


Ni listigas kelkajn temojn, kiuj ofte estas pritraktataj dum lecionoj pri Kunvivado en la lernejoj de LBV. Tiuj temoj reliefe aperas en la esploroj de la lernantoj, kun diskutadoj kiuj ne kritikas aliulajn kondutojn, sed evidentigas la neceson je zorgo pri la korpo kaj Spirito de ĉiu, cele al formado de junularo pli sana kaj inklina al ŝanĝoj, kiuj bonfaros al la tuta socio:




kiel eviti la perforton surbaze de genro;




protekto de la Naturo kaj daŭripova elvolviĝo;



kontraŭ la seksa turismo de infanoj;



efikoj de malŝparo de nutraĵoj;



kritika taksado pri la elektronikaj ludiloj;



infan-junula diabeto, anoreksio, bulimio kaj aliaj sanperturboj kaŭzitaj pro subpezeco aŭ pro trodikiĝo.

gejunuloj dum la lecionoj, kiel kunpartoprenantoj de ilia propra lernado sub gvido de atentaj edukistoj kaj aliaj profesiuloj dum la aktivadoj de la formala eduko aŭ pedagogiaj ludoj.

En tiu proponita metodologio, la edukanto ne staras kiel simpla aŭdanto. Dum la tuta kleriga vojo, infanoj kaj gejunuloj estas kuraĝigitaj de la edukistoj al esplorado, diskutado kaj realigo de efektivaj agadoj, kiuj povas estigi pozitivajn ŝanĝojn al la komunumo en kiu ili loĝas.

Ĉar niaj lernantoj travivas situaciojn de socia vundebleco, oni kuraĝigas ilin partopreni en projektoj, kiuj plibonigas la lokajn kaj ĉirkaŭantajn strukturojn, kie ili loĝas, tiel estiĝas proponoj por solvi malfacilajn problemojn en ilia komunumo, kio favorigas ankaŭ iliajn familiojn. Tio fariĝas pli evidenta ĉe la finjaroj de la baza instruado, kiam la junulo sin preparas por la grava paŝo de sia akademia studado, por fariĝi akceptata de la universitato. Ĝuste en tiu momento oni konstatas la rezulton de formado ricevita en la Institucio, ekde la plej frua aĝo, bazita sur valoroj de la Ekumena Spiritualeco cele al kompleta edukado. La kunpartoprenita scio dum tiuj jaroj preparas lin, ekzemple, por la alfronto de demandoj rilatantaj al droga dependeco.

Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, la neleĝaj drogoj mortigas pli ol 500 personojn ĉiutage en la mondo (inter viroj, virinoj kaj infanoj). Tiuj nombroj troviĝas en

la Tutmonda Raporto pri Drogoj 2013, diskonigita de la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Drogoj kaj Krimo (UNODC), kaj montras la gravecon de la problemo.

## Kono kaj juĝkapablo

Ĉi-teme nia sperto montras ke, sin limigi al eksteraj intervenoj, kiel prelegoj kaj klarigaj lecionoj, ne sufiĉas por forte atingi la konsciencon kaj starigi la juĝkapablon de junulo. Estas necese partopreni en la konstruo de la mema defendmekanismo. Ni montros per ĉi tiu artikolo kiel la apliko de MAPREI starigas la lernanton fronte al alvokoj kutimaj ĉe la junularo, multfoje venintaj **el amikecaj** rilatoj kun iamaj kolegoj kiuj, en iuj okazoj, estas kapablaj influi la novulon, ekzemple al irado sur la danĝera vojo de drogaĉoj.

Por ilustri la temon, nenio pli bonas ol ekzameni la proponon de la lernobjekto Kunvivado, kreita de la fondinto de la Edukejo Bona Volo, cele diskutigi pri temoj ligitaj kun sekseco (per unuigo de sento kaj respondeco al la ĉiutagaj demandoj) kaj al la nuntempaj okazaĵoj.



Clayton Ferreira

La edukanto ne staras kiel simpla aŭdanto. Dum la tuta kleriga vojo, infanoj kaj gejunuloj estas kuraĝigitaj de la edukistoj al esplorado, diskutado kaj realigo de efektivaj agadoj, kiuj povas estigi pozitivajn ŝanĝojn al la komunumo en kiu ili loĝas.

## MAPREI paŝo post paŝo

La planado kiun ni kunhavigos celis la trian studjaron de la mezlernejo, dum la unua trimonato de 2014.

**1a etapo: mobilizo, identigo de la enhavo/temo** — ni prezentis la historion de inventisto, kiu volis kaj sukcesis *faligi pluvon*. En la debatoj kun la gelernantoj, la demando estis: "Kien vi volas faligi pluvon en via vivo?", kaj ĉiu skribis sur papero siajn celojn por la sekvaj jaroj;

**2a etapo: individua serĉado de scio** — komenciĝis esploro pri la temo "Drogoj kaj konsekvencoj: seksa impotenteco kaj sterileco". La gelernantoj

# "Lernu diri ne al drogaĉoj!" asertas la gelernantoj de LBV.

La pritrakto de la temo en la lernobjekto Kunvivado, en la lernejoj de LBV, fariĝas ampleksa pere de la gelernantoj mem, kiuj esploras kaj portas por debatoj informojn, atestojn, sciencajn datumojn cele produkti materialon por sentemigi aliajn gejunulojn. Legu sekve kelkajn tiajn opiniojn elektitajn el inter mezlernejanoj de la tria studjaro, de la Edukejo Bona Volo, en la ĉefurbo San-Paŭlo, Brazilo.



Fotoj: João Nery

"Datumoj pri drogoj estas la plej alarmaj. Nuntempe eĉ infanoj jam enhospitaliĝas pro uzo de alkoholo. Tio estas absurdo!"

**Letícia Lopes, 17-jara**



"Lernu diri ne! Ne timu diri ne. Tio estas esenca, simpla kaj efika."

**Rafael Pacheco, 18-jara**



"Mi povas efektive diri ke mi havas geamikojn de infaneco, kiuj nuntempe vivas en la mondo de drogaĉoj. Kaj mi ne pentas ke mi ne akompanis ilin, ĉar mi sciis ke tio ne bonfaros al mi. Se mi ne havus tiun apogon de la lernejo, mia destino ne estus la sama."

**Diego Lemos, 17-jara**

povis uzi revuojn, gazetojn, retejojn aŭ kuracistajn dokumentojn, elektante la punktojn, kiujn ili konsideris pli elstaraj por prezenti dum instrutempo;

**3a etapo: ensocialigo de scio** — la edukatoj kunhavigis kun siaj klasanoj la rezulton de siaj esploroj;

**4a etapo: konkludo** — oni petis ke ili grupe preparu prezenton por la pli junaj klasanoj per iom da esploritaj informoj, klarigante la efikojn de leĝaj substancoj (alkoholaĵoj kaj tabako) kaj neleĝaj (diverstipaj drogaĉoj) en la vira kaj virina organismoj. Tiaj substancoj povas kaŭzi sterilecon kaj seksan impotentecon, malebligante la estiĝon de la familio cele al kontinuecon de ties historioj;

**5a etapo: prezento de la rezultoj** — estis signifa la momento kiam la pli maljunaj gelernantoj (ĉirkaŭ 17-jaraj) povis kunhavigi siajn esplorojn kun la pli junaj (inter 11 kaj 13 jaroj) – ĝuste en tiu paŝo la rezultoj de MAPREI fariĝas pli videblaj, ĉar oni povas klare observi la komprenon de la scio akirita dum la esploroj kaj diskutoj pri la temo, peratajde la edukisto. La laboraĵo de la tria-studjaruloj fariĝis tiel signifa ke ili estis invititaj partopreni en speciala eldono de la programo *La Temo estas Jesuo*, elsendata de Bona Volo TV. Tie la gelernantoj detale rakontis pri la realigita laboraĵo (kiu venigis al ili grandan kontentecon pro la percepto spertita dum la kunvivado kun la pli junaj), dum prezento de raporto pri siaj esploro-rezultoj kaj individuaj konkludoj. Profite al tiu etapo de MAPREI, prezentiĝis afiŝoj, komiksoj kaj aliaj artaj prezentaĵoj pri la temo, kreitaj de la gelernantoj dum la gepatra kunsido de mezlernejo kaj ĉe la fermo de la trimonato. Tiu fakto venigis pli grandan trankvilon al la familioj, ĉar ili vidis la iniciatemon kaj konojn pri la temo, kio garantias malproksimecon de iliaj gefiloj disde substancoj, kiuj kaŭzas tiom da damaĝoj al infanoj kaj gejunuloj;

**6a etapo: individua konkludo** — fermante la trimonaton, la gejunuloj taksis la rezultojn kaj debatis la temon, individue konkludante pri tio, kio la propono de tiu esploro pri drogaĉoj aldonis al ilia vivo.

## Implikiĝo kaj dialogo cele al efektiva lernado

Ĉiuj cititaj paŝoj estis elpensitaj cele farigi MAPREI-on ne sole ia transdono de informoj, sed ebligi ke la gelernantoj esprimu sin pri la temoj, per ilia implikiĝo en la pedagogiaj procedoj.

La aplikebleco de tiu noviga eduka koncepto estas markita per distingeco kunigi *"Cerbon kaj Koron"*, kiel proponite de Paiva Netto, ĉar nepras investi en la formadon de intelekto, ne forgesante ke ni ĉiuj estas estuloj konsistantaj el menso kaj animo, kiuj bezonas la spiritan provizadon, aŭ kiel diras la gvidanto de LBV, nepras havi *"ian rigardon trans la intelekto"*.

La geinstruistoj de la lernejoj de Legio de Bona Volo disvolvas kune kun la gelernantoj esplorojn kaj diskutojn pri temoj kiuj konsistigas instruplanon de Ekumena Spiritualeco, kiu etendiĝas tra la tuta instruprogramo, plenumante la pedagogian proponon de la Institucio, per kunigo de formado (sentoj) kun la necesa informo (intelekto), cele al disvolvo de la biopsikosocia spirito de la edukatoj. Plej gravas tio ke temas pri agadoj kun signifaj efikoj kaj replikeblaj, kio farigas la lernadon eĉ pli riĉa kaj partopreniga, kun bonaj fruktoj por la socio. ●

### Edukado: ia rigardo trans la intelekto

Spektu filmeton por pli koni pri la pedagogia propono de Legio de Bona Volo.



# Edukado kaj daŭripoveco

Debatkunsido ĉe Unuiĝintaj Nacioj venigis profesiulojn pri eduka fako, el pluraj landoj.

La ronda tablo, sub la gvido de la reprezentanto de LBV en UN, **Danilo Parmegiani**, konsistis el s-ro **Vicente Amaral Bezerra**, reprezentanto de la Konstanta Misio de Brazilo ĉe Unuiĝintaj Nacioj; la psikologo kaj psikanalizisto **Joseph DeMeyer**, kunprezidanto de la Komitato de NROj pri Edukado kaj reprezentanto de la Societo pri Psikologiaj Studoj por Socialaj Temoj (SPSSI, en la angla), ambaŭ en Unuiĝintaj Nacioj; **Suelí Periotto**, doktoriĝanta pri Edukado ĉe Pontifika Katolika Universitato (PUC-SP), gvidanto de la Pedagogio de Amo kaj de la Pedagogio de Ekumena Civitano kaj direktorino de la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto; kaj **Sâmara Malaman**, magistrino pri Speciala Edukado ĉe Universitato Kean.



Nataly Peres

La 29an de aŭgusto, 2014, Legio de Bona Volo, brazila civila organizaĵo, kunordigis debaton pri la temo *Edukado por daŭripovaj civitanoj — Plej bonaj agadoj de Brazilo el Rio+20*. La debatkunsido estis efektivigita enkadre de la 65a Jara Konferenco de NROj de la Departemento pri Publika Informado (DPI), kiu okazis inter la tagoj 27a kaj 29a de aŭgusto, en la novjorka sidejo de UN, en Usono.


Okaze de prelego pri la pedagogia propono de la Institucio, la ĉeestantoj havis la okazon konatiĝi kun kelkaj sukcesaj historioj, rezultoj de la Pedagogio de Amo kaj de la Pedagogio de Ekumena Civitano, kreitaj de la edukanto José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de LBV. La debatkunsido venigis profesiulojn pri la eduka fako, el pluraj landoj, kiel d-ino **Julie Gerland**, el Francio, reprezentanto de Monda Organizaĵo de Asocioj por Antaŭnaska Edukado (OMAEP, en la franca) ĉe Unuiĝintaj Nacioj. *"Mi vere ĝojis vidi tiom da amemo en eduka sistemo, kiu zorgas nutri ne nur la cerbon de infanoj, sed efektive ilin eduki pri kiel vivi la vivon, kiel konstrui novan komunumon, kiel fariĝi konscia pri la medio"*, ŝi diris dum intervjuo al Superreto Bona Volo pri Komunikado.

> "Kion vi faras per edukado por infanoj, tiaj valoroj, ĉio tio estas tre grava. Kaj mi estas tre feliĉa ke mi partoprenis en tiu prelego; gratulon pro ĝia organizado."
>
> **Celine Paramunda,** Reprezentanto de Medicina Misia Fratinaro en Unuiĝintaj Nacioj

D-ino Julie Gerland reliefigis ankaŭ la gravecon prizorgi edukadon eĉ antaŭ ol naskiĝo de infano: *"Mi eksciis hodiaŭ ke vi havas ankaŭ programon, kiu inkluzivas la patrinojn. [...] Se ni povus havigi al la patrinoj, dum ilia gravediĝo, la okazon esti ĉirkaŭitaj de la komunumo, anstataŭ resti izolitaj en iliaj domoj [...], tio estus vere bonfara dum gravedeco, kaj la bebo venus en la mondon sentante sin amata, protektata, konektita kun aliaj infanoj, kaj kiel tutmonda civitano. Kaj ni scias ke nuntempe tio estas science pruvita: Edukado vere komenciĝas antaŭ ol naskiĝo, do kial ne inkluzivi la patrinojn? Kaj iu diris 'inkluzivi la patrojn', kaj mi plene konsentas"*.

## Lernantoj por Paco

La edukistino Sâmara Malaman prezentis la rezultojn de




Nataly Peres

Dum tiu evento, la reprezentantoj de LBV rerenkontis ĉe UN esperantistajn amikojn, kiuj ĉeestis la debatkunsido. De maldekstre dekstren: D-ro **Humphrey Tonkin**, emerita prezidanto de Hartforda Universitato kaj eksprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA); **Kim Youn-Long**, kiu doktoriĝas pri ekonomia geografio ĉe Universitato Clark; **Neil Blonstein**, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj; kaj Felipe Duarte, el Legio de Bona Volo.




Eliana Gonçalves

Video montras la rezultojn de la plej lasta eldono de la programo *Lernantoj de Bona Volo por Paco*, aplikita ĉe la lernejo Lincoln Avenue, en Orange (Nov-Ĵerzejo). Dum la unua jarduono de 2014, surbaze de esploroj kaj studoj, la lernantoj ellaboris afiŝojn kaj recikligajn projektojn por la lernoĉambroj, kaj plenumis kolektivan purigadon ĉe la ĉirkaŭaĵoj de la lernejo, mobilizante la komunumon pri mediŝirmado.

la eduka programo de LBV de Usono, nome *Lernantoj de Bona Volo por Paco*, efektivigita en usonaj publikaj lernejoj.

En freŝdata eldono de la programo, LBV enkondukis sian pedagogion en la lernejon Lincoln Avenue, en Orange (Nov-Ĵerzejo), per la temo *Mia Hejmo estas la Planedo Tero — Nia rolo kiel civitanoj medie konsciaj*.

El Barato, s-ino **Celine Paramunda**, reprezentanto de Medicina Misia Fratinaro en Unuiĝintaj Nacioj, registris: *"Kion vi faras per edukado por infanoj, tiaj valoroj, ĉio tio estas tre grava. Kaj mi estas tre feliĉa ke mi partoprenis en tiu prelego; gratulon pro ĝia organizado. Kaj mi ankaŭ kopiis vian videon en mian USB-poŝmemorilon. Do, mi uzos ĝin por instrui miajn lernantojn, al kiuj mi parolas pri Unuiĝintaj Nacioj kaj bonaj agadoj".*


El Domingo, la magistriĝanto pri Edukado ĉe Universitato Lehigh, **Daniel Méndez**, esprimis siajn impresojn: *"La informoj, kiujn mi ricevis de tiu debatkunsido estas daŭripovaj, mi dirus, ĉar formi lernanton por ke li komprenu sian medion, sian civitanan devon, kaj partoprenu en sia komunumo, tio estas tre grava. [...] Reveninte al mia lando, mi ŝatus provi enkonduki tiun programon tien".*

## Evoluiga celaro post la jaro 2015

La 65a Jara Konferenco de NROj de DPI kunvenigis la civitanaron, internaciajn retojn kaj aktivulojn por kune ellabori laborprogramon por mobilizi la interkonsentojn pri la evoluiga celaro post la jaro 2015. Oni diskutis pri la Daŭripova Evoluiga Celaro (SDGs, en la angla), kiuj anstataŭigos la Jarmilan Evoluigan Celaron (MDGs, en la angla), kies limdato estas 2015, kaj ankaŭ pri nova interkonsento pri klimato por anstataŭigi la Protokolon de Kioto.

En la dua tago de la evento, la UN-Radio en la portugala invitis Legion de Bona Volo paroli pri sia pedagogia gvidlinio. Dum intervjuo gvidata de la raportisto **Eleutério Guevane**, la edukistino Suelí Periotto reliefigis la zorgon flanke de LBV por disponigi bonkvalitan instruadon kune kun valoroj riĉigantaj la konojn kaj favorigantaj la komunumon.


Ia plibona mondo povas komenciĝi per unu sola gesto
Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6
Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24
PACO SUR LA TERO AL LA HOMOJ DE BONA VOLO
LBV
PLENUMU VIAN PARTON!
www.legionofgoodwill.org





# ĈIAM FAVORE AL LA *Vivo*

## Urĝas kontraŭbatali memmortigon, kaŭzo de unu miliono da mortoj ĉiujare en la mondo.

**Leila Marco** | Fotoj: Felipe Tonin

La radia dramserio *Rememoroj de Memmortiginto*, adaptita el la samnoma libro mediume skribita de **Yvonne do Amaral Pereira**, priskribas klare kaj sincere la gravajn rezultojn de memmortigo. En la rakontoj, kiuj konsistigas la radian dramserion, la ampleksa spiriteca perspektivo kontrastas kun la materiisma koncepto en la vivhistorio de multaj karakteroj, komence konvinkitaj pri la misideo, ke la morto estas la fino de ĉio. Ekzemple, la verko kurioze preparis surprizon al esperantistoj, pruvante la gravecon de la internacia lingvo en spiritkolonioj, alivorte, en dimensioj post la fenomeno nomata "morto".

Iniciato de ĵurnalisto, radiparolisto kaj verkisto **José de Paiva Netto**, prezidanto de la Institucioj de Bona Volo (IBV-oj)*, la projekto liveras ampleksan pritrakton de la problemo, konsiderante ĝiajn homajn kaj spiritajn dimensiojn. Koncerne la temon, li klarigas: *"La morto ne estas la fino de la homa ekzistado. Ĉu vi ne kredas? Vi plene rajtas. Sed kion diri, se tio veras?! Premiu*

*La esprimo rilatas al Legio de Bona Volo, al la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, al la Fondaĵo José de Paiva Netto, al la Fondaĵo Bona Volo kaj al la Eduka Asocio Bona Volo.

# Atendu iom pli...

## “Se ekzistas malluma nokto, ankaŭ ekzistas sunradia mateno.”

**Paiva Netto**
Ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto.

*vin, mia amikino, mia amiko, per la rajto al dubo, la bazo de scienca verkado, kiu, per senĉesa esplorado, daŭre trabatas novajn vojojn por la Homaro”*, kaj li citas ankaŭ la faman eldiron de radikronikisto kaj poeto **Alziro Zarur** (1914-1979), la karmemora fondinto de Legio de Bona Volo: *“Memmortigo solvas nenies angoron”*.

Surbaze de tiu premiso, la revuo BONA VOLO kolektis la opiniojn de kuracistoj kaj aliaj esploristoj por analizi la kaŭzojn de potenciale memmortiga konduto kaj proponi rimedojn por ĝia antaŭmalhelpo. La celo estas kontribui por enkonsciigi kaj plikomprenigi la problemon kaj ĝiajn sekvojn. Dum tiu irado, valoroj, kiel frateco kaj helpemo, multfoje estas esencaj por helpi tiun, kiu sentas sin tiel malfortika, ke li deziras fini sian propran vivon.

## Afero de publika sano

La taksita nombro de unu miliono da memmortigoj ĉiujare estas tre maltrankviliga, laŭ la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS).

Por montri la gravecon de tiu problemo en la mondo, laŭ komparo kun lokaj datumoj, la brazila menskuracisto **José Manoel Bertolote**, profesoro-doktoro de la Departemento pri Neŭrologio, Psikologio kaj Psikiatrio de la Ŝtata Universitato de San-Paŭlo Júlio de Mesquita Filho (Unesp) kaj konsultisto de MOS por la temo, freŝdate prezentis kelkajn klarigajn datumojn. *“Nuntempe la urbo Botucatu havas 130 mil loĝantojn. En la mondo, ĉirkaŭ sep urboj kiel Botucatu ĉiujare mortas pro memmortigo”*, li komparis. Substrekindas, ke oni ne konsideris en tiu taksado datumojn rilatantajn al provoj venigi finon al la propra vivo, kies ciferoj, en Usono ekzemple, fariĝas 40-oble pli grandaj ol tiuj de efektivigitaj memmortigoj.


Leandro Rocha/ACI da FMB
José Manoel Bertolote

Bazita ankaŭ sur studoj de MOS, la fakulo atentigas pri maltrankviliga konstato, nome, ke gejunuloj pli kaj pli emas adopti kondutojn mortoriskajn. Nuntempe tio jam fariĝas la tria morto-kaŭzo ĉe individuoj ekonomie aktivaj aĝantaj inter 15 kaj 44 jarojn, same kiel la dua ĉefa kaŭzo respondeca pri mortoj de gejunuloj inter 15- kaj 19-jaraj. Alia homgrupo kiu bezonas zorgon estas tiu de maljunuloj, kies kresko de mortokvanto rilatiĝas al forlasiteco kaj izoliteco en kiu vivas multaj el tiuj personoj, foje malvigliĝintaj pro gravaj aŭ degeneraj malsanoj.


Liliane Cardoso
Blanca Werlang

Laŭ lia opinio, iu ajn malsano duobliĝinta post 20 aŭ 30 jaroj postulus de la aŭtoritatuloj drastan decidon. “*Kelkaj studoj montras ke, se ni konsideru la gejunulojn inter 15- kaj 25-jaraj, [ni rimarkas ke] la kresko de memmortigo en la lastaj 20 jaroj estas eĉ pli granda. Temas pri terura kresko de memmortigoj inter junaj viroj”*, li komentis.

Aŭtoro de la ĵus lanĉita *Memmortigo kaj ĝia prevento*, libro kun informoj kaj strategioj por preventi la problemon, d-ro Bertolote citas studojn en pluraj landoj, kiuj indikas la plej ordinarajn risko-faktorojn. Tiel, krom alkoholaĵo kaj drogoj, *“malantaŭ 90% de la memmortigoj en la okcidenta mondo sin kaŝas iu mensa malsano [ĉefe deprimo kaj skizofrenio]”*.

Antaŭ la faktoroj indikantaj riskon, necesas ke oni restu atenta cele havigi solidaran apogon. *“Jen kion ni devas fari, proksimiĝi al tiu kiu montras signon ke li ne fartas bone. Povas esti ĝene demandi ‘Ho, kiel vi fartas?’ kaj neniu volas efektive scii, ĉar tio estas nur ĝentilaĵo. Foje la persono diras: ‘Ha, mi*

*bonege fartas', sed interne la bonfartulo putriĝas... Male, se vi proksimiĝas kaj diras: 'Sincere, mi vidas ke vi ne fartas bone. Ĉu mi povas fari ion? Ĉu mi povas helpi?'. Tiam eble vi bezonos haltigi vian aktivadon, akompani tiun personon al iu loko, sed vi povos savi unu vivon."*

## Sufero

Informado estas fundamenta en la tasko preventi kazojn de memmortigo, laŭ la opinio de doktorino pri psikologio, **Blanca Susana Guevara Werlang**, ĉefprofesoro de la Fakultato pri Psikologio de la Pontifika Katolika Universitato de Suda Riogrando (PUC-RS) kaj kunordiganto de la Grupo pri Prevento kaj Interveno en Perforta Konduto ĉe PUC, Brazilo. *"La homoj ne havas informojn pri memmortigo, disvastiĝas multaj tabuoj ĉirkaŭ la temo. Ekzemple, se la profesiulo en la lernejo havus pli da kono pri la risko-faktoroj, kiuj estas la protektantaj faktoroj, kiaj kondutoj povas montri tion, ankaŭ li povus helpi, paroli al la familio, konduki la kazon al iu psikologiisto, menskuracisto aŭ al alia aparta fako de la publika sansistemo"*, ŝi diris.

D-rino Blanca Werlang atentigas pri tio ke studi la memmortigan konduton estas ankaŭ diskuti pri la afero koncernanta al suferado. *"Tiuj individuoj multe suferas. Foje, eĉ povas okazi ke oni ne pensas pri morto, sed, jes ja, venigi finon al tiu neeltenebla doloro."* Laŭ la spertulino, misfunkcioj ekestas en la psiko-disvolviĝo de la koncernulo: *"La persono komencas akumuli mensajn streĉojn kaj suferojn. Se oni malmulte komunikiĝas kun aliuloj, se havas familiajn problemojn, se ne estas ligita al iu spirita referencilo — kia ajn ĝi estu —, se havas malmultajn amikojn, tiam oni venas al suferiga situacio"*.

Konsiderata psikosocia perturbo de multoblaj kaŭzoj, memmor- →



Shutterstock.com

## LA POVO DE PREĜO

La religieca sento estas valora aliancano dum la revigliĝo de memestimo kaj deziro vivi. Krom la praktiko de preĝo kaj de meditado, laŭpruve kapabla helpi al korpa kaj anima ekvilibro, la fakto ke iu persono apartenas al iu religia komunumo signifas per si mem socia apogo tre favora en tiuj momentoj de intensa sufero. La prezidanto-predikanto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, José de Paiva Netto, kutime diras ke en tiuj malfacilaj momentoj, kiam ŝajne ne estas elirvojo por certaj demandoj, li ekpreĝas kaj per tio li akiras forton por venki la barojn. En sia artikolo "Ankaŭ ateisto povas preĝi", li atentigas: *"Preĝo ne estas rifuĝejo de senkuraĝuloj kaj de maldiligentuloj. Ĝi nin suprenlevas, laboro nin realigas. La **Papo** preĝas, **Dalai-lamao** meditas, **Chico Xavier** preĝis, rabenoj kantas siajn petegojn, la evangelianoj kantas siajn laŭdojn al Dio, islamanoj recitas la Noblan Koranon... Kio estas Preĝo, se ne Amo disponebla por grandaj agoj? Kiam ateisma frato faras ion, kio helpas la kolektivon, tiam li preĝas. Preĝado ne estas simple figura ago. Ĝi estas plej forta ilo, kiun posedas la homa esenco, la Dia Kapitalo. Kiel asertis la katolika germana monaĥo **Tomaso el Kempis** (1380-1471), en sia* Imitado de Kristo*,* 'sublima estas la arto interparoli kun Dio'.*"*

# Ĝi ne solvas angoron...

## "Memmortigo solvas nenies angoron."

**Alziro Zarur (1914-1979)**
Fondinto de LBV


→ tigo estas kompleksa fenomeno. *"Oni ne sin mortigas, nur pro tio ke oni sentas depriman perturbon. Enestas faktoroj sociaj, ekonomiaj, familiaj, spiritaj. Estas la kombino de ĉiuj elementoj, kio efektive igas la konon psike malorganiziĝi kaj estigi neeltenenblan suferon."*

La psikologiistino montras saman maltrankvilon pri la altaj proporcioj de tia okazaĵo ĉe la pli juna homgrupo. Tiurilate, d-rino Blanca komprenas kiel grava faktoro la mankon de referencoj. *"La sento estas ke la familio transdonas la respondecon al la lernejo, la lernejo al la familio, ankaŭ la socio ne prenas sur sin; la figuroj de reprezentanteco estas tre konfuzitaj. (...) Nuntempe, la valoroj pri frateco, la spiritaj valoroj, la zorgo ne ĉagreni aliulon, prunti kaj dividi aferojn kun la proksimulo estas forgesitaj. Religieco estas protekta faktoro, same kiel teni bonajn familiajn rilatojn"*, ŝi klarigis.

### Forta impreso sur familio kaj amikoj

La morto de iu, kiu decidis forlasi la vivon, kutime fariĝas malfacile superebla por la familio kaj amikoj. La brazila ĵurnalistino **Paula Fontenelle** travivis hejme tiun realaĵon: la memmortigon de la patro, en 2005. Serĉe de respondoj, ŝi dediĉis tri jarojn por esplori la temon, dum kiam ŝi analizis diversajn kazojn kaj intervjuis psikologojn kaj aliajn fakulojn. La rezulto de tiu laboro estas la libro *Memmortigo, la estonteco rompita — Gvidilo por pluvivantoj.*

En la verko, la aŭtorino pruvas la gravecon atenti la personojn pli proksimajn al la plenumanto de la malesperiga ago, same kiel la neceson rompi la silenton kiu envolvas ilin. *"En la literaturo pri tiu lernofako, oni nomas pluvivanto tiun kiu perdis iun por memmortigo, ĉar tiu devos kunvivi kun tio dum la cetero de la vivo kaj postvivi post la doloro de tiu perdo, kiu doloras aliaspekte... Ĉar, kiam ni perdas iun pro akcidento, malsano, pro naturaj kaŭzoj, ni parolas al ĉiuj, kaj ĉiuj demandas kiel okazis. Tio estas parto de la funebro, kaj ni parolas pri tio. Sed, kiam temas pri memmortigo, neniu demandas, neniu volas aŭdi. (...) Mi memoras ke nia familio travivis tion."*



Paula Fontenelle

La ĵurnalistino kredas ankaŭ ke, iamaniere, la agreso de tiu ago resonas sur tiuj plej proksimaj. *"Kiam la persono mortas, estas nature ke oni ege surpriziĝas, ĉar oni ne kredas ke li faris tion; poste, oni eksentas sin kulpita: 'Kiel mi ne rimarkis tion?'. La sento de propra kulpo estas normala kaj ankaŭ kolero... 'Kial li faris tion al mi? Li estis senrespondeca. Kiel li povis fari tion al la propra filo?'."*

Kiel averton, la libro indikas la ĉefajn signojn de la memmortiga konduto cele helpi al ĝia kontraŭstaro. *"Fido tre gravas, ĝi estas unu el la decidaj faktoroj kiuj subtenas kelkajn personojn. Fido je Dio, je iu Supera Estulo, sendepende de la religio, kiun oni sekvas, tre similas al apogo de iu etendanta la manon. Fido estas kredi je la estonteco, kredi ke tiaĵo [doloro, sufero...] ĉiam pasos."*

Por la kazo de amata persono, kiu montras tiajn signojn, ŝi rekomendas ke unue oni estigu kanalon de komunikado, havigante al li atenton; poste, oni strebu kompreni, faciligu la malpezigon de la koro. *"Alia afero tre grava, kiun ankaŭ la kuracistoj diras, estas provi starigi ian konsenton kun la persono: 'Bonvolu doni al mi unu monaton por ke ni vidu ĉu vi sentos vin pli bone aŭ ne. Nur tion mi petas de vi'. Mi faris tion al amikino mia... mi venigis ŝin al menskuracisto, kaj ŝi plu vivas ĝis hodiaŭ."* ●

# KIEL IDENTIGI INKLINOJN AL MEMMORTIGO


Multnombraj esploroj pri konduto de memmortiganto prezentadas komunajn trajtojn, kiuj indikas la ideon forpreni la propran vivon. Vidu sube kelkajn el tiaj manifestaĵoj.

## PAROLAJ

- ✔ Persono kiu pensas sin mortigi vortigas sin per jena diro: "La vivo ne havas sencon" aŭ "Ne valoras la penon vivi".
- ✔ Kutime li adiaŭas iun, kiun de longe li ne vidas, karajn personojn.
- ✔ Li vivas en la pasinteco, ne kapablas paroli pri la estonteco.
- ✔ Troa maltrankviliĝo pri morto.

## GESTOJ KAJ SIGNOJ

- ✔ Li komencas liberiĝi de materiaj havaĵoj.
- ✔ Izoliteco.
- ✔ Li skribas pri morto kaj memmortigo.
- ✔ Subita ŝanĝo de konduto.
- ✔ Senkuraĝiĝo kaj malalta memestimo.



# ĈU LA SPIRITOJ POVAS INFLUI NIAJN DECIDOJN?



Shutterstock.com

**Gabriela Marinho**



Felipe Tonin

Gabriela Marinho, Agema Junulo de la Bona Volo de Dio, de San-Paŭlo (Brazilo).

En diversaj epokoj la Homaro registris rakontojn pri dialogo inter malsamaj dimensioj de la vivo. Ili estas rakontoj pri profetaĵoj, sonĝoj en kiuj prauloj reaperas, enrigardoj kiuj savis vivojn kaj ebligis eksterordinarajn sciencaj malkovrojn. Kaj kiel klarigi tion?

Tiaj fenomenoj, laŭ la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito*[1], klarigitaj laŭ spirita perspektivo, estas frukto de la intuicio — la plej rapida, ofta kanalo de tiu dialogo inter la homa kaj spirita mondoj. Intuicio estas deviga al ĉiuj ni kiuj havas tiun komunikkapablon, ĉar esence ni estas Eterna Spirito.

Tial, ĉiumomente ni povas konektiĝi kun spiritoj de aliaj dimensiaj sferoj pere

de mekanismoj de mediumeco, kiel klarigas la Religio de la Tria Jarmilo, per la vortoj de ĝia prezidanto-predikanto, Paiva Netto: *"Envere, politikistoj, filozofoj, religiuloj, sciencistoj, artistoj, sportistoj k.a.... **ĉiuj estas mediumoj**, sed, se ili ne estas mediumoj evangelizitaj kaj iluminitaj per la travivaĵo de la Nova Ordono de la Kristo, nenio plia ili povos fariĝi ol instrumentoj de malbono. Kutime ili eĉ ne scias kio estas mediumeco, sed ili povas disvolvi ĝin, se ili volas, por ke ili ne fariĝu facilaj kaptitoj de ne evoluintaj spiritoj"**2. [Grasaj literoj estas de ni metitaj.]

## Konscia unuiĝo

Esence gravas ke tiu kunligo kun la spirita mondo estu konscia, nome ke ni sciu ke la mekanismo estas reala por ke ni mem elektu la nevideblajn estulojn kun kiuj ni volas ĉeesti. Tiamaniere la atento estu pli intensa ĉar, ĉu oni kredas aŭ ne, mediumeco okazas pere de niaj pensoj, vortoj kaj agoj. Ni elektu do kunestantojn kiuj venas el superaj spiritaj sferoj, ĉar ĉiu komunikado kun ĉi tiuj portas la dian celon de frateco.

En la Sankta Blibio ni trovas ekzemplojn de tia spirita unuiĝo. Kaj Anĝeloj kaj nepuraj spiritoj malkaŝe sin manifestis al la homoj, montrante ke tio estas okazaĵo tre anktikva. La Amata Majstro, kiu realigis eksterordinarajn miraklojn sub la protekto de Dio kaj la helpo de Siaj Anĝeloj, instruis la preĝon kiu havigas al ĉiuj tre efikan spiritan komunikilon.

Per la ekumena preĝo *Patronia* (Evangelio, laŭ Mateo, 6:9 ĝis 13), Jesuo estis pioniro en la mediuma edukado de la popoloj, kiam Li instruis al ili kiel peti la Dian Protekton cele al forigo de iu ajn malutila spirita influo, kaj kiam Li montris per Sia ekzemplo ke la ĉiela helpo venas laŭmezure kiel la bonaj agadoj estas faritaj farove al aliulo.

## Karitato estas esenco de la Spirita Vivo

Karitato, la solidara ago, sinonimo de Amo, movata per bonaj pensoj kaj vortoj, estas unu el la rimedoj kiuj igas la intermondan komunikadon pli subtila kaj rapida. Ju pli ni emas helpi, des pli ni trovas amikajn Spiritojn akordiĝantajn kun niaj intenco, pretajn kunblabori kun ni.

El la Supera Spirita Mondo, tiel klarigas d-ro **Bezerra de Menezes***3 (Spirito) per la revuo *Jesuo Alvenas!*, ekumena publikigaĵo de la Religio de la Universala Amo, p. 44: *"Kiam Legioj malsupreniras el Spiritaj Sferoj tiel malproksimaj de la terplanedo, **superante barojn de pezegaj ombrejoj, por rekte helpi tiujn kiuj vibras per la Bono, tiujn kiuj petegas la benojn de la Kristo**, ni komprenas **ke la Spirita Karitato ne estas nura valora kvalito, sed ia esenco de vivo en la Spirita Mondo**. Karitato estas la vehiklo kiu veturigas la Spiritojn en la malproksimaj spacoj. Ekster Karitato, ni povus diri ke la Kristaneco ne havus la Dian Oksigenon, kiu igas* ĝin *nemortema"*.

Praktikado de pacienco, kunlaboro, humileco fajnigas nian mediumecon favore al ni kaj al niaj proksimuloj. Cetere, kiom multe ni povas fari per la helpo de tiuj supruloj kun privilegia vidado, kiujn ni nomas Gardanĝeloj?

Tiel konkludas Paiva Netto: *"La leciono de la Templo de Bona Volo estas, ke se jam ekzistas (kiel efektive ekzistas) deviga kunligo de la Supra Homaro kun tiu malsupra, bedaŭrinde nekonscie kaj malutile, kun katastrofaj rezultoj, kaj se neevitebla estas tiu influo, ĝi uziĝu por la Bono, ĉar la kontakto kiu ordinare okazas ankoraŭ estas inter spiritaj estaĵoj malicemaj, malprogresintaj. Ni laboru — kun plena konscienco — por tiu plenumiĝo. **Ĝuste tion deziras la Superaj Spiritoj**"**4. [La substreko estas nia.]



D-ro Bezerra de Menezes

*1 **Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito —** Ankaŭ nomata Religio de la Nova Ordono, Religio de la Tria Jarmilo kaj Religio de la Universala Amo. Temas pri la Ekumena Religio de Brazilo kaj de la mondo.

*2 Elprenaĵo de la libro *Spiritaj Gvidlinioj de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito*, volumo II, p. 283.

*3 **D-ro Bezerra de Menezes (Spirito) —** Ĉiela kunordiganto de la Monda Revolucio de la Lumaj Spiritoj, en la Kvara Revelacio, la Religio de la Universala Amo, sub la komando de Paiva Netto.

*4 *Spiritaj Gvidlinioj de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito*, volumo II, p. 283.

# JESUO BENAS LA INFANETOJN

**(Evangelio de la Sinjoro de Paco, laŭ Luko, 18:15 ĝis 17.)**

La Kristo de Dio instruadis en Judeo, kiam oni venigis al Li kelkajn infanojn, por ke la Dia Amiko tuŝu ilin kaj preĝu; sed la Disĉiploj admonis la homojn, kiuj tiel agis, dirante: *"Ne ĝenu la Majstron"*.

Jesuo, tamen, deklaris: *"Lasu la infanojn veni al mi, kaj ne malhelpu ilin; ĉar el tiaj estas la Regno de Dio. Vere mi diras al vi: Kiu ne akceptos la Regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin."* Kaj, ilin tuŝinte, la Dia Majstro foriris.

# KOMENTARIO DE LA SOLDATETO DE DIO

Arkivo BV



Frato Paiva Netto ĉiam instruas al ni, ke *"Ju pli proksime al Jesuo, des pli for de problemoj"*, ĉar Kristo estas nia rifuĝejo, nia fortikaĵo. Kaj ni bezonegas Lin, por ke nia familio povu resti sub Lia protektado kaj apogado.

Sed por ke Jesuo povu eniri nian hejmon, ni devas ĉiam teni feliĉon enkore, farante tion, kion la Dia Majstro petis de ni ĉiuj, nome helpi ĉiujn, ne elektante kiun, kaj plenumi la instruon *"Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis."* (Evangelio laŭ Johano, 13:34), kiun Li postlasis al ĉiuj, por ke ĉio pliboniĝu ĉirkaŭ ni.

Mi memoras, ke ni studis, en Leciono pri Ekumena Moralo, pri la Dia Regno, kaj lernis, kion Jesuo instruis al ni, nome ke tiu Regno *"estas inter ni"* [Evangelio de la Dia Kristo, laŭ Luko, 17:21]. Kiam ni bone agas, per reala Amo, unueco, Solidareco, respekto, kaj ni ĉiam studas Liajn ĉielajn instruojn, ni venigas al nia Spirito tiun Dian Regnon. Kiam la Majstro instruis en Judeo, Li donis ekzemplon, por ke ni agu same kaj ankaŭ parolu ĉie: hejme, en la lernejo kaj kun la amikoj, pri tiu mesaĝo ekumena kaj paca.

**Carlos Henrique da Silva de Oliveira, 10-jara.**
**Bangu, Rio de Janeiro/RJ (Brazilo).**

# INFANO INSTRUAS PLENKRESKULON

**Alziro Zarur**

Infanoj per kant' espera
Pepas ĉe mia fenestro!
Ĉu io en mond' mizera
Pli belas ol ĉi orkestro?
La liberigo muzika
Flugas tra mia kvartalo...
Dissonas rave unika
La infana kantregalo!


Kiam blovos uragano,
Al via hejmo minace,
Bene ŝprucu el infano
Bon-Vola kanto plenpace!




Desegno: William Luz

Desegnaĵo pri Alziro Zarur (1914-1979), la karmemora proklaminto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito. La originalo de ĉi tiu poemo estis portugallingve verkita de li.

Eltrovu la vojon kiu kondukas la kokcinelon al la heliko.




Kolorigu.



**RESPONDO**

Eltrovu la vojon kiu kondukas la kokcinelon al la heliko.
Respondo: 4



**LBV DE BRAZILO**
Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP
CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500
www.lbv.org • www.bonavolo.com

**LBV DE ARGENTINO**
Av. Boedo, 1.942 • CP 1239 • Buenos Aires
Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar

**LBV DE BOLIVIO**
Calle Asunta Bozo, 520 •Zona Alto Obrajes (sector A)
La Paz • Casilla de Correo, 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759
www.lbv.org.bo

**LBV DE USONO**
36 W 44th Street • Mezzanine • Manhattan
Nova York • 10036 Tel.: (+1646) 398-7128 •
www.legionofgoodwill.org

**LBV DE PARAGVAJO**
José Asunción Flores, 3.438 com Solar Guaraní • Bernardino
Caballero • Asunciono • Tel.: (+59521) 921-100/3
www.lbv.org.py

**LBV DE PORTUGALIO**
Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto
CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt

**LBV DE URUGVAJO**
Bulevar José Batlle y Ordoñez, 4.820 • Aires Pures
Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+598) 2304-4551
www.lbv.org.uy

facebook.com/**BonaVolo** twitter.com/**BonaVolo** youtube.com/**BonaVolo**